

Tagiĝo 33

Cirkulero de Esperanto Junularo en ĈSR - eldonas: Dům Osvěty, odbor Esperanto
redaktas: Kuzník Jaroslav, Rooseveltova 17, Opava 1956/X

Alparolo de la ĈD de EJ-ĈSR dum jarkunveno la 29.7.1956 en Hradec u Op.

* Junaj geamikoj – karaj gesamideanoj *



Denove pasis unu jaro de post la lasta jarkunveno de la ĉs. esp. junularo, kiu okazis la 9-an de julio 1955 en Otrokovice, en la kadro de la I-a Tutŝtata Konferenco de esp. pacdefendantoj.

Ni revenu por momento en la ĵus pasintan jaron kaj resumu la agadon de la ĉs. esp. Junularo kaj de ĝia Centro.

El la funkciuloj de la centro la ĉefdelegito klopodis plenumi la bazajn taskojn de sia agadsfero, inter kiuj la ĉefaj estis helpi evoluigi la aktivecon de la ĉs. esp. junularo kaj sekvi la kurantan okazadon en la junulara vivo en la tutŝtata teritorio, kaj verki por la unuopaj numeroj de la centra junulara organo la cirkulero „Tagiĝo“, resuman raporton pri tiu ĉi akktiveco.

Mi konscias ke mi ne faris en mia funkcio ĉion, kio estis farenda kaj ke mi ne posedas la bezonatajn energion kaj iniciatemon, kiuj laŭ mia opinio, devas esti karakterizaj trajtoj de la tutŝtata junularestro.

Se mi tamen, malgraŭ miaj mankoj, almenaŭ iom estis utila al nia kara junularo, mi povas diri, ke mi faris tion kun la konscio, ke mi servas al bona afero.

Parolante pri la funkciado de la junulara centro mi devas kun rekono emfazi la ofereman laboron de la redaktoro de "Tagiĝo", kiu sekurigis al ni regulan informadon de nia membraro. Mi kredas, ke nia organo, kelkfoje eĉ plaĉe presita kaj ilustrita bone plenumis sian rolon. Ĝi plaĉis al la legantoj ne nur en ĈSR, sed ankaŭ al eksterlandaj amikoj kaj ĝi ricevis laŭdon ankaŭ de la prezidanto de T.E.J.O. - La laboron de nia kulturdelegito s-ano Novobilský karakterizis iniciatemo, kompetento kaj sperteco. La gvidadon de la junulara konkurso li plenumis, laŭ mia opinio, tre bone. Ni esperu, ke li ne nur daŭrigos la bonŝance komencitan laboron, sed pliprofundigos ĝin.

El la regionaj delegitoj de la esp. junularo en ĈSR plej iniciatoplena estis tiu en Ostrava; s-ano Dr. Kočvara. Li ne nur kolektadis informojn pri la vivo de junularaj rondetoj kaj raportis ilin al la ĉefdelegito, sed, kio estas dezirinda ĉe ĉiuj regionaj delegitoj, stimulis aktivecon en la ekzistantaj grupoj kaj elvokis fondiĝon de novaj. Tute regulajn raportojn sendadis al la ĉefdelegito, plue, la regionaj delegitoj en Praha kaj en Brno. Ni deziras regulan raportadon ĉiumonatan ankaŭ el la ceteraj regionoj. Ni konstatas kun kontento, ke ankaŭ en Slovakio la junulara movado komencas konturiĝi pli konkrete kaj s-ano Milan ZVARA povis raporti al ni, dum la kuranta jaro, la unuajn sukcesojn, promesante informi nin pri okazinta aktiveco sufiĉe riĉa.

Ni nun devaa reveni al la rezolucio, kiun akceptis nia pasintjara jarkunveno, kaj kiu donis la principojn de nia agado por 1955-56. Ni konstatu, kiel ni, laŭ la ĉefaj trajtoj, plenumis nian pasintjaran rezolucion. - Ĝia unua paragrafo diras: "Direkti nian laboron al plifortigo de la tutmonda paco per pli proksima kunlaboro kun MEM kaj lokaj packomitatoj". Pri tiu ĉi punkto, kiu emfazas laboron porpacan pere de Esperanto, ni povas raporti:

Ni sukcesis realigi kunlaboron kun la junulara movado en Bulgario, Hungario, Jugoslavio, Nederlando, Polujo, Svedujo, USSR (urboj Moskvo, Leningrad, Erevan, Tomsk). Al pluraj el ili ni sendis 7-paĝan raporton pri la historio kaj aktuala stato de la junulara E-Movado en ĈSR. - Por tiu

celo ni dissendis proks. 100 ekzemplerojn de "Tagiĝo" en fremdlandon, kio fine estas kronita per la sukceso, ke oni proponis ĝin kiel oficialan organon de TEJO, sub la titolo "Tagiĝo de la JUNA VIVO". - Ni ricevia inviton partopreni la TEJO Kongreson 1956. - Bonan kunlaboron kun la loka packomitato disvolvis s-ano Frantl, Opava. - La grupo en Svitavy iniciatis okaze de jubileo de la urbo, ke ĝi ricevu en Esperanto multajn bongratulojn, ekz. el Brazilo, Francujo kaj aliaj malproksimaj landoj. - Atentinda estas la rezulto atingita, dank' al la iniciato de ges-anoj Ginz kaj Nývltová, en la kunlaboro kun la japana revuo "Infanoj de la Mondo". - La grupo en Žďár nad Sázavou bone organizis partoprenon en la ekspozicio de infandesegnaĵoj en Britujo. Ĝia kontribuado aperis en la brita televido kaj la grupo ricevis gratulleteron de la ĉeĥoslovaka ambasadoro pro bona propagando pri la laboro en la ĉs-aj lernejoj.

Dua § de la rezolucio diris: "Pliperfektigi nian lingvan nivelon a) per respondeca preparo de kunvenprogramoj. En ĉiu kunveno havi prilingvan duonhoreton. b) instigi la membrojn legi Esp. librojn, kiuj estas prunteblaj precipe en migranta biblioteko en Praha kaj en ceteraj. c) kulturi en la kluboj kantadon, recitadon kaj teatraĵojn". Pri tiu ĉi punkto ni povas raporti:

a) Laŭ la raportoj el la opaj grupoj promesplene disvolviĝas la laboro por lingva perfektigo; (en Plzeň laboras eĉ rondeto por tradukado de libroj).

b) Ankaŭ la pruntado de libroj funkcias, kiel ni pozitive scias el informoj ricevataj, tamen, estas necese organizi pli fidindan funkciadon kaj kontrolon de tiu ĉi fako en nia laboro.

c) Pli da atento necesas por la praktika uzado de kantoj, publikigataj en Tagiĝo. Ni scias, ke en kelkiuj lokoj oni neglektis tion ĝis nun.

La 3-a § de la rezolucio diras: "Organizi publikajn E-kursojn, propagandi E-on en uzinaj kluboj, klerigaj konsilantaroj kaj en lernejoj." Pri tiu ĉi punkto ni povas raporti:

a) Lingvajn kursojn oni organizis en sufiĉe multaj lokoj, pri kio vi povis legi en "Tagiĝo".

b) Propagandon en lernejoj faris la grupo en Opava (cirkulero), en D.Bludovice (s-ano Schwetter), en Jakartovice (s-ano Hadámek) kaj en pluraj aliaj urboj. Modelan publikan Esp. ekspozicion organizis la grupo en Písek. Precipe gratulinda estas iniciato de s-ano Schwetter, instruisto en D.Bludovice, kiu elvokis pere de Esp. internacian gimnastikan konkurson de lernejoj en proks. 12 landoj (inter ili de Vietnamo kaj Ĉina Popola Respubliko), en la kadro de la Internacia Tago de Infanoj. Tiu faro ne nur servas al plifortigo de monda paco, sed grave ankaŭ al propagando Espo en lernejoj laŭ internacia skalo.

La 4-a kaj lasta § de la pasintjara rezolucio postulis: "Per utiligo de lastaj spertoj plibonigi kaj disvolvi kunlaboron de unuopaj grupoj, precipe ĉeĥaj kaj slovakaj, pere de reciprokaj vizitoj, regionaj kunvenoj kaj cirkuleroj." Pri tiu punkto ni raportu:

Ne disvolviĝis interregionaj vizitoj en la dezirinda grado. Ni scias pri nur malmultaj tiaj, en la ĉeĥaj landoj; en Slovakujo ili stagnas. Sukcesajn regionajn kunvenojn organizis la junularaj grupoj en Praha, Brno, Ostrava, Třebíč.

Ni devas mencii plue pri nia aktiveco inter la du jarkunvenoj:

Pligrandiĝis la nombro de la lokaj grupoj junularaj, kiuj per la sendo de plenigita matrikulo aliĝis al nia esp-ista junularo. La plena listo de la lokaj rondetoj, kiuj sendis al la ĉefdelegito la matrikulojn, estas (de okcidente orienten): Praha, K.Vary, Všebor ap. Cheb, Netolice, Písek, Plzeň, Pardubice, Lanškroun, Brno, Svitavy, Třebíč, Žďár n-Sáz., Olomouc, Drahotuše, Rýmařov, Ostrava (VŽKG), Ostrava-Hrabůvka, Dolní Bludovice, Opava, Příbor, Štěbořice, Vítkov. Sume 22 lokoj. Ĉiam ankoraŭ mankas la matrikulo de rondeto en Kroměříž.

Tamen ne ĉiuj nomitaj rondetoj eniĝis ankaŭ fakte, labore, en nian junularan movadon. La respektivaj regionaj delegitoj atingu, ke ankaŭ tiuj ĉi rondetoj partoprenu en nia kunlaboro kaj sendu regule sian agadraporton: Všebor, Netolice, Drahotuše, Rýmařov, Příbor, Štěbořice, Vítkov.

Ni volas pritrakti kunlaboron (en tiu ĉi senco) ankaŭ de la rondetoj en Slovakio. La bazo estis jam metita per kelkfoja raporto de s-ano Zvara pri la aktiveco en Slovakio. Tamen la reala maniero de kunlaboro povos esti starigita, laŭ mia opinio, nur post la tutŝtata konferenco de la ĉs-aj esp-istoj dum oktobro en Olomouc, kie ja estos fondita tutŝtata E-asocio, sed Slovakio havos

memstaran organizon.

Someraj Esperantistaj Tendaroj. - En la tempo inter la lasta kaj tiu ĉi jarkunveno estis aranĝitaj 2 Someraj tendaroj de la junularo, la pasintjare en Chvalatice apud Vranov zorge de la junulara rondeto ĉe la Domo de Kulturo en Třebíč; la nunjara ĵus okazas en Žimrovice, organizita de la E-fako de Domo de Kult. en Opava. Ili ambaŭ denove helpis pliperfektigon de nia esp-ista junularo kaj krome donis al ĝi eblecon pasigi la feriojn aŭ libertempon en samideana medio. Ni danku pro tiu ĉi merito ambaŭ E-fakojn, kaj ni aprezu specialan oferemon de membroj el Opava kiuj jam je la 4-a foja prenis sur sin tiun ĉi ne nur gravan, sed tempo- kaj labor-postulan taskon. Kelkajn semajnojn antaŭ la malfermo la membroj el Opava, helpataj kelkfoje de esperantistoj el Ostrava, veturis sur la terenon de la SET por tie plenumi; senprofite, la teknikajn prepar-laborojn. Ni ankaŭ danku al la grupo en Opava; ĉar ĝi per multobligo de tekstoj de la Historio de l' Esp-o - Movado multe plifaciligis al la tendaranoj ellerni tiun ĉi stud-fakon. - Ni povas aldoni, ke la unua etapo de la nunjara tendaro finiĝis kun rezulto tre kontentiga en la ekzamenoj pri la gramatiko, literaturo kaj historio de Esperanto.

Rilate eventualan partoprenon de ĉs-aj esp-istoj en la tutmonda junulara festivalo en Moskva mi povas informi pri la respondo de ĈSM-Ĉeĥoslovaka Junulara Ligo, je nia petskribo pri alpreno de kvin junaj esp-istoj en la ĉeĥoslovakana delegacion al Moskva: ĈSM ne intencas konsistigi ian apartan delegacion, do ankaŭ ne esp-istan. En la delegacio estas meritplenaj laborantoj de ĈSM, proponitaj de la lokaj grupoj kaj de distriktaj komitatoj de tiu ĉi organizaĵo. - Ni tamen ne rigardas tiun ĉi respondon kiel definitivan solvon kaj ni provos fari pluajn paŝojn. Tamen mi devas rimarkigi, ke la ĉs-aj partoprenintoj en la lasta varsovia festivalo devis pagi laŭ informo de partopreninta s-anino Marie Hrubá, 1.200 Kčs por la vojaĝo al Varsovio kaj la restado tie. Se oni simile ankaŭ por Moskvo postulus pagi la vojaĝkostojn - tiam la tuta afero fariĝus ankaŭ demando pri la mono.

Fine ni memorigu al ni la aktualan situacion de la tuta E-movado en ĈSR:

La Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista en ĈSR (TKKE) estis oficiale komisiita de la ministerio de kulturo (post decido de la centra Komitato de la partio) funkcii kiel prepara komitato de fondota ĉeĥoslovaka Esp.-asocio. TKKE laŭ peto de la ministerio ellaboris projekton de statuto de la venonta asocio. Por realigi la fondon, TKKE kunvokas tutŝtatan konferencon de la ĉs-aj esp-istoj al Olomouc je la 20.-21-a de oktobro. Tiu ĉi fonda kunveno de ĉs. esp.-asocio okazos sub oficialaj aŭspicioj kaj dum ĉeesto de eksterlandaj delegitoj. - Esperanto do ne plu estas rigardata kiel afero kosmopolitisma kaj la oficoj ne plu bremsos nian agadon. Tamen la centraj oficoj dezirata ke en la tutŝtata E-centro partoprenu ĉiuj esp-istaj movadoj kaj unuopuloj en nia lando. Kompreneble ankaŭ la ĉs-a esperantista junularo membriĝos ĉe la tutŝtata organizaĵo. Ni imagas, ke en la organizaĵo estu junulara sekcio kun gvidanto el inter la junulara kaj krome ke la junularo havu postenojn en la komitato de la tutŝtata asocio. Ni esprimu tion en rezolucio, kiun ni pritraktos antaŭ la fino de nia kunveno. Ni ankaŭ postulu adekvatan lokon en la estonta asocia gazeto.

Rezolucio por la plua agadsezono


La Esperanto Junularo en ĈSR,

- 1/ konsiderante la daŭran bezonon de intensa, ĉiuflanka laboro por la tutmonda paco kaj internacia amikiĝo,
 - 2/ konsiderante ke en la lasta tempo la kondiĉojn por tiu ĉi laboro per Esperanto grave faciligis la rezolucio de UNESKO kaj la kreskanta aktiveco de sovetaĵ samideanoj,
 - 3/ konsiderante, ke ĝis nun ĝi kapablis trovi adekvatajn fortojn kaj rimedojn por relative sukcese plenumi nemalgrandajn taskojn rezultantajn el la antaŭaj rezolucioj,
- decidas

starigi kaj efektiviĝi en la venonta (nun malfermata) laborperiodo la sekvantajn principojn:

- a/ daŭre sekvi kaj propagandi la klopodojn por la mildigo de la tensio en internaciaj rilatoj;
 - b/ helpi pacan kunvivadon kaj amikecon inter la nacioj per disvolvo de amikaj rilatoj kun diversnaciaj junulaj k.a. grupoj kaj ties membroj kaj per vigla interŝanĝo de kulturaferoj sur la bazo de uzo de la internacia lingvo Esperanto en ĉiam pli kreskanta amplekso;
 - c/ tiucele vekadi inter ĉeĥoslovakaj gejunuloj komprenon, intereson kaj aktivan partoprenon en tiu ĉi ideo-sfero kaj en la akiro kaj perfektigo de la Esperantolingva scio;
 - d/ samcele fortigadi harmonion kaj firman kuntenon de la kolektivo de sia anaro kaj plivastigadi ties nombron;
 - e/ por la laŭeble rapida kaj plena atingo de la indikita alta celo daŭrigi kaj pliigi la ĝisnunajn interjunularajn konkursojn, regionajn kunvenojn, seminariojn, publikajn ekspoziciojn, internaciajn somertendarojn Esperantistajn, regulan kaj laŭveran, plenan informadon de ĉiuj siaj anoj kaj kunlaborantoj pri la atingitaj rezultoj kaj mankoj per cirkuleroj aŭ gazeto;
 - f/ kunlabori semideane kun packomitatoj kaj organizaĵoj samcelaj, precipe Esperantistaj ĉu enlandaj (Somerlernejo Doksy, ĈSM k.a.), ĉu eksterlandaj (UEA, Domo de Kulturo en Leningrad, Moskovskij Komsomolec).
 - g/ post fondo de centra tutŝtata Esperanto-organizo definitive aliĝi al ĝi kaj sub ĝia egido efektivigadi kun ties subteno la starigitajn supre principojn sur la bazo de samideana kompreno, lojaleco, egalrajto kaj kunlaboro, sub la kondiĉo, ke ne aperos malhelpoj aŭ limigoj por la efektivigo de laborplano difinita laŭ la principoj de tiu ĉi rezolucio.
- La estraro de la venonta landa asocio sekurigu en la asocia gazeto lokon (3paĝoj) por raportoj kaj artikoloj pri la junulara movado.
- La gvidanto de la junularo fariĝu aŭtomate junulara sekciestro ĉe la Asocio kaj samtempe komitatano en la funkcio de asocia vicprezidanto. La junularo de la ĉeĥaj regionoj havu en la asocia komitato ses postenojn.

Resuma referato de la kultura delegito de ĉs. Esperanto Junularo.



Mi raportos nun, kiel kultura delegito de la ĉeĥoslovaka Esperanto Junularo, pri kelkaj miaj taskoj plenumitaj en la pasinta laborperiodo 1955/56.

Traleĝante mian pasintjaran referaton el Otrokovice kaj komparante ĝiajn perspektivojn kun la hodiaŭa efektiva realo, mi devas kun kontento diri, ke la jaro ĵus finiĝinta signifis pliboniĝon de nia laboro, ke ĝi alportis bonajn sukcesojn.

Tre populara temo de la pasinta konferenco estis "krizo de la junulara movado en nia lando". Jes, ĝi fakte ekzistis, sed mi povas diri, ke plejparte ni jam likvidis ĝin. Sur kiu kampo?

Tre akuta doloro estis malbona kontakto inter nia centra organo TAGIĜO kaj ĝia legantaro. La enhavo estis artefarita de du aŭ tri personoj kaj la legantaro neniam montris sian opinion pri ĝi: ĉu kontentan ĉu malkontentan. La kaŭzojn de tiu ĉi stato mi pli detale analizis pasintjare. Estas fakto, ke post T.27, kiu la unan fojon aperis en plaĉa rotaprinta aranĝo subite ĉio ŝanĝiĝis. Naskiĝis intima kunlaboro kaj kontakto inter la redakcio kaj legantaro. Tio estis jam perceptebla signo de la resaniĝo de nia movado. La T-27 alportis ankaŭ unua provon de nova konkurso, kiu laŭ la decido el Otrokovice, anstataŭis la estintan, kiu estis longdaŭra kaj pro malfacila poentado tro peza. La nova maniero akcentis mallongan daŭron de ĉiu unuopa konkurso. La eĥo estia surpriza. Venis multaj respondoj precipe solvataj tradukaj tekstoj. Mi do vidis, ke ili ne darfas en la konkursoj manki.

Post la unua konkurso sekvis la dua en T.28, poste tria kaj en 31. numero de T. aperis la lasta. Sume mi ricevis 188 taskojn. Tio nepre estas grava sukceso kaj manifestiĝo de la grupaktiveco. Mi devas publike gratuli al la Junularo en Žďár, kiu sekvis la konkursojn plej regule kaj sendadis plej valorajn kontribuadojn. Ankaŭ Junularo en Brno kaj Plzeň partoprenis iujn tre multnombre. Sed aliflanke estas vero, ke ekzistas multaj jun. grupoj, kiuj partoprenis eĉ ne unu konkurson! - Ĝojiga estis ankaŭ intereso pri la formo kaj enhavo de konkursoj. Mi ricevis plurajn sugestojn, el kiuj plej gravaj estis jenaj: problemo de la procenta pritakso, kaj neceso organizi konkursojn laŭ lingvaj

kategorioj ABCD. Kun tiu ĉi propono mi kompreneble konsentis, sed mi ne havis tempon por ĉion aranĝi kaj prepari 3 - aŭ 4 speciajn tekstojn. Jen la kaŭzo kial tiu ĉi bona ideo ne estis realigita.

Por la nova sezono mi ne plu povos plenumi taskon de konkursgvidanto. Sed s-anino Soňa Zedníková, kiu estas sperta literatura laborantino, transprenos ilian gvidon. Ŝi ankaŭ realigos viajn proponojn.

Mi do resumas: La konkursoj helpis plivigli laboron de niaj grupoj. Ili ankaŭ malkovris kelkajn talentitajn ges-anojn. En simila aranĝo gvidos la konkursojn s. Zedníková el Praha ĝis fino de la jaro 1956. Ĉar en la j. 1957 ne plu aperados en Opava la Tagiĝo, ni devos trovi novajn metodojn.

Kaj jen al la pritakso. Dezirinda estus premii ĉiun konkurson aparte. Sed tio ne estis pro mona situacio eble. Tial mi konsideris serion de 4 konkursoj kiel tuton kaj elektis jenajn tri premiojn:

S. Březina el Junularo Žďár n. S. kiel unuan premion li ricevis Sinjoron Tadeon de A. Miczkiewicz.

Duan premion s-ano J. Werner el Brno - Sinjoron Tadeon kaj trian Gustav Kremláček, Žďár n.S. - Ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo (de Scherrer).

Mi gratulas al la venkintoj kaj al ĉiu, kiu la konkursojn partoprenis. La saman intereson montru ankaŭ per la konkursoj venontaj!

Pri la lingvaj kategorioj de nia junularo estis ofte duboj kaj diskutoj. Mi, kiel kultura delegito, decidiĝis pasintjare iamaniere normigi apartenon de nia anaro al unuopaj kategorioj. Helpe de la instruistoj el pasintjaraj SET ni trastudis la problemon kaj eldonis unuecigajn instrukciojn. Estis kreita la Ekzamena komisiono, kiu konsistas el tri personoj por tri fakoj: la gramatiko, historio kaj literaturo. La respektivaj fakaj gvidantoj prilaboris kaj kompilis surbaze de siaj instruistaj spertoj DEMANDARON, kiu estis ankoraŭ antaŭ SET-1956 multobligita kaj disponigita al vi. Ĉi jaraj tendaraj ekzamenoj jam estis aranĝitaj konforme al ĝi. Estas dezirinde, ke ĉiu grupo posedu almenaŭ unu ekzempleron de la Demandaro. Mi petas, ke ĉiuj grupaj ekzamenoj estu realigataj laŭ instrukcioj, kiuj troviĝas en la antaŭparolo al la Demandaro.

Alia sufiĉe grava tasko, kiun mi entreprenis pasintjare estas kompilo de la Junulara Historio. Ĝi estas kolektiva laboro de preskaŭ 10 aŭtoroj pri la postmilita sed precipe pri lasta kvinjara periodo de nia junularorganizo. Post kiam la verko estos preta, ĝi sur pli ol 100 paĝoj estos interesa gvidilo tra nia laboro post la jaro 1945, sed precipe post la jaro 1950 kiam la junulara movado tiom brile ekagis. La unuopaj ĉefdelegitoj rakontas tie pri la sukcesoj, malhelpoj kaj sana impeto kaj entuziasmo de la junularo. En aparta ĉapitro oni legos pri SET, kiuj estas vere unika aranĝo de nia junulara movado sen eksterlanda analogio. Kalejdoskope kuros antaŭ ni jaroj de plej malfacila laboro, dum kiuj nia movado estis mirinde unueca, vi legos pri la jaroj de ioma malstreĉiĝo ekstera, sed samtempa krizo interna. La historio finiĝas en ĉi tiu jaro, kiam ni ne plu timas, ke ni estas nelegala organizo kaj kiam ni oktobre ricevos denove oficialan kadron. La laboro super la Historio marŝas malpli rapide ol mi imagis. La kaŭzo estas tia, ke la kunlaborantoj devas studi abundan materialon en siaj arkivoj, kio postulas longan tempon, kiu ĉie hodiaŭ mankas. La verko estos nepre grava dokumento por nia movado en estonteco.

Nun mi ankoraŭ kure mencios kelkajn aliajn faritaĵojn:

Por Nia Spegulo mi pasintjare verkis informan artikolon pri SET, por Bulteno en Praga 2 artikoletojn pri Otrokovice. En la Tagiĝo mi aperigis en pasinta jaro ĉirkaŭ 20 artikolojn, kiuj estis parte organizaj, instruaj kaj kulturaj. En la nomo de nia junularo mi sendis leteton al la poeto J. Baghy, kies respondo vi povas legi en T.28. Mi aldonis fotojn el SET kaj kanton laŭ liaj vortoj fare de Kudla. Al kelkaj junularoj mi dissendis petatajn kantojn aŭ librojn. Mi provis ligi kontakton kun la junularo en Moskvo kaj Jugoslavio, kio nur parte sukcesia. En mia funkcio mi ankaŭ organizis instruadon en ĉi jara SET. Mi dankas al s-anoj Echtner kaj Mařík, kiuj akceptis instruistajn taskojn por gramatiko kaj historio.

Post la unua etapo de SET, kiu tiom bone sukcesis, mi eluzas la okazon por sincere danki al la Junularo en Opava, kiu denove pruvis, ke ĝi estas kapabla organizanto de altkvalitaj someraj aranĝoj.

Salutletero de TKKE

prezidanto J. Vitek al la konferenco

Praha, la 18a-n de julio 1956.

Karaj junaj geamikoj!

Okaze de via konferenco akceptu de la komitato de TKKE sincerajn bondezirojn kaj ankaŭ kelkajn amikajn vortojn:

Ni ĉiuj ĝojas en samtempo, ke la cirkonstancoj por nia movado en Ĉeĥoslovakio dank' al komunaj klopodoj estiĝas pli favoraj ol ili estis en tempo ne longe pli frua. En tiuj ĉi sukcesoj ankaŭ vi partoprenas per via entuziasmo kaj per la laboro, kiu por multaj landoj estas ekzempla. Nia ŝtato bezonas bonajn kaj fortajn homojn, kiuj kapablas oferi multon. Ni rigardas vin tiaj kaj estas konvinkitaj, ke en akorda laboro de ni ĉiuj ni povos baldaŭ festi sukcesojn, kiuj instigos alilandajn esperantistojn sekvi nin. El tiu ĉi perspektivo ni entreprenu ĉiujn niajn agojn, kiujn sanktigas niaj esperantistaj pacaj ideoj. Sub tiuj ĉi ideoj vi ankaŭ havu vian konferencon kaj ĝiaj traktadoj dokumentu, ke nia ŝtato havas fortan, klare pensantan kaj agantan esperantistan junularon!

Kun sinceraj salutoj al vi ĉiuj

via

Josef Vitek p.m.

Referato de "Tagiĝo" redaktoro.



Unue mi dezirus kelkvorte ripeti la historion de nia modesta cirkulero kaj pri ĝia utileco en nia junulara E-movado.

En jaro 1950 dum monato junio naskiĝis en Opava unua eta, unufolia ĉeĥa cirkulero "Informační list", kiu servis kiel varbilo, entuziasmigilo kaj informilo de komenciĝantaj s-anoj kaj E-kursanoj el Opava. Tio okazis en tempo kiam kreiĝis la junulara Esp.grupo en Ostrava kaj post kies ekzemplo komencis pli malpli malrapida kreado de junularaj grupoj en aliaj lokoj de nia respubliko. Kaj jen montriĝis la bezono iel komuniki la spertojn de la unuopaj grupoj al la ceteraj, ekestis bezono de iaj rimedoj kiel entuziasmigi unu la alian en la lokaj grupoj, kaj por tiu ĉi celo estis en kelkaj regionoj komencita eldonado de junularaj modestaj multobligitaj cirkuleroj. Inter tiuj cirkuleroj kiel la plej frue eldonata estis en Opava la supre jam notita "Informační list", kiu post la tempo fariĝis simple cirkulero sen ia nomo, sed jam dissendata al multaj grupoj en nia lando, skribita parte ĉeĥe, parte esperante. De monato al monato la eldonantoj en Opava plilarĝigadis la enhavon de cirkulero, kaj kiam montriĝis, ke tiu jam iom helpas al pli multaj grupoj, estis decidite doni al ĝi ian nomon - kaj tiel naskiĝis "Junularo agu!", kiu jam havis sian certan difinon, apartenanta speciale por junularaj grupoj, jam preskaŭ sole skribita en Esperanto, enhavanta artikolojn fervorigajn, senĉese batalantaj por pli kaj pli intensigi kaj plivigli la junularan movadon. Multobligita cirkulero jam estis eĉ 16-18 paĝa, eldonata regule monate, eĉ dum la plej malfavoraj tempoj de likvido de EAĈSR (Asocio), dum likvido de E-kluboj kaj timemo de pli aĝaj s-anoj eĉ publike konfesi, ke ili estis esperantistoj. Ni diru, ke la eldonado de cirkulero okazis tute sen leĝa permeso, tamen la bezono de ia ligilo inter la gesamideanoj postulis jam eldonon de ia centra junulara cirkulero. Pro soldatservo de la redaktoro estis la cirkulero fine de jaro 1951 kun sama nomo transdonita por eldonado al Gottwaldov, kie ĝi ricevis la plaĉan veston, bele aranĝita, kun pentraĵoj kaj interesa legaĵo.

Sed nur du monatojn eltenis s-anoj el Opava ne eldonadi ian cirkuleron kaj tial ili decidis eldonadi novan cirkuleron por Ostrava regiono. Tiel naskiĝis nova, vere denove modesta multobligita cirkulero kun nomo "TAGIĜO" kaj la unua numero estis eldonita en januaro 1952. Samtempe estis eldonata "Jun. agu." en Gottwaldov, kiu tamen post unujara aperado tie, pro foriro

de s-anoj Nĕmec kaj Vítovský, ĉesis aperadi.

Tagiĝo fariĝis organo de Esp. Junularo en ĈSR. S-ano Novobilský redaktis ĝin ĝis mi revenis novembre en jaro 1953 kaj denove mi transprenis ĝian eldonadon. Tagiĝo poste iom post iom vestiĝia en pli belan aspekton malgraŭ ĉiam multobligata kaj enhavanta multajn erarojn. Tamen nia junularo jam havis en ĝi sian gvidanton kaj helpanton en la poresperanta laboro. Kun Tagiĝo komencis kunlabori pliaj s-anoj kaj tiel la enhavo iom post iom pliboniĝis. Post elekto de s-ano Mařík kiel ĉefdelegito de E-Junularo en nia lando, aperis aŭtune en jaro 1955 Tagiĝo jam presita sur rotaprint kaj estis forsendata al preskaŭ 600 s-anoj, el kiuj estis preskaŭ 100 fremdlandaj. Ĝiaj plej viglaj kaj plej bonaj kunlaborantoj fariĝis s-ano Novobilský laŭ literatura, kultura kaj konkursa enhavo kaj s-ano Mařík kiel ĈD, kiel atribuento de diversaj raportoj pri la junulara kaj tutmonda E-movado. Diversspeca, riĉa enhavo, kelkfoja plaĉa eldono de Tagiĝo, jam pli altnivela - fariĝis Tagiĝo ŝatata legaĵo de niaj gesamideanoj.

En nuna tempo ekestas diversaj nesolveblaj problemoj kun ĝia plua eldonado en jaro 1957, tial estas decidite peti la post nelonga tempo starigotan novan Esp. Asocion en nia lando, kiu rajtos eldonadi presitan Esperanto organon, dediĉi en ĝi al junularo en nia lando almenaŭ 3 paĝojn, kiujn iu el junulara sekcio sendepende redaktus.

Jen vi aŭdis en mallonga skizo pri nia Tagiĝo, kaj por mi restas aenio plia ol el ĉi tiu loko sincere danki el ĉiuj helpandoj de ĝia eldonado kaj al ĉiuj kontribuantoj de la sufiĉe bonkvalita kaj interesa enhavo de Tagiĝo. Mi dankas al ĉiuj legantoj kiuj helpis per kia ajn kritiko plibonigi ĝin kaj mi esperas, ke malgraŭ tio, ke la cirkulero de post nova jaro jam ne aperados kiel memstara cirkulero, tamen ni ĉiuj batalos por tio, ke ni povu havi ankaŭ plue nian sekcian junularan aldonon de centra gazeto kaj ke ankaŭ tiu aldonon donos al nia s-anaro sufiĉe fortan volon kaj entuziasmon labori en nia junulara, vere speciala laboro, sen kiu niaj grupoj ne povus bone prosperi.

Permesu al mi ĉi tie en nomo de vi ĉiuj danki al s-ano Novobilský por lia rara kunlaboro kaj semtanpe por ĝia ofereco transdoni al li kiel rememoron la libron de J. Baghy romanon "Hurá!". Al s-ano Mařík mi ankaŭ esprimas miajn senfinajn dankojn.

Nia junulara movado devas iri man' en mano kun la agado de ceteraj esperantistoj, sed ĝi devas konservi ĉiujn trajtojn kiujn ĝi elkreis dum la tuta pasinta periodo de ĝia esto.

Mi deziras tial al nia laboro pluajn sukcesojn.

Skiza protokolo el la Junulara jarkunveno en Hradec.

Jarkunveno de la Esperantista Junularo en ĈSR okazis 28.-29.7. en kastelo de Regiona Kulturcentro en Hradec u Opavy. Partoprenis 86 personoj el 34 lokoj de ĈSR kaj eksterlandanoj: Imre Ferenczy, junulara sekretario de Hungarlanda E-Konsilantaro, oficiala delegito de HEK, juna instruisto nederlanda Henk Saalting, kaj la sabatan kulturvesperon ankaŭ G. Nilsson el Stockholmo. Salutletero venis i.a. de k-do Hujucz parlamenteno de Ĉina Popola Respubliko.

s.Mařík malfermis je 9.15 horo kunvenon kaj ĉiuj kantis Esp. himnon. Poste li tralegis saluton de TKKE. s.Vuk Echtner transdonis saluton al nia kunveno de Jean Forge. s. Imre Ferenczy transdonis saluton de hungara junularo. - ĈD s. Mařík faris ĉefan referaton pri tutjara agado. Li disdonis librodonaĵojn al Opava kaj Třebíč por modela organizo de SET kaj al jun. Svitavy por modela laboro. s. Novobilský - kulturdelegito havis referaton pri tutŝtata kulturagado. Poste li transdonis libropremiojn por plej aktiva ĉeesto en junulara konkurso. s. Mařík bonvenigis s. Henk Saalting el Nederlando, kiu diris sian salutprelegon. s. Jiří Vychodil salutis nian kunvenon en nomo de nevidantaj samideanoj. s. Kuzník redaktoro de Tagiĝo - havis referaton pri nia organo kaj donis al s. Novobilský libropremion por lia meritplena agado. s. Vuk Echtner disdonis atestojn al absolventoj de unua parto de SET.

Elekto de estraro: s. Mařík proponis, ke ĝis fondo de tutŝtata asocio restu malnova estraro. Propono estis ĉiuvoĉe akceptita. - s. Mařík tralegis proponon de rezolucio por ĝin pridiskuti. Rezolucio estis ĉiuvoĉe akceptita sen ŝanĝoj.

Diskuto

dr. Mohapl Olomouc informis nin pri kunveno de TKKE en Doksy, kie okazis preparlaboroj por fondi asocion en ĈSR. Informis nin pri proponita programo dum tutŝtata kunveno en OLOMOUC. Junularo fariĝos interes-sekcio kaj ĝia ĉefdelegito estos membro de Asocia komitato. Samtempe estos en Olomouc fonda kunveno da Slovakoj, kiuj havos apartan komitaton.

Imre Ferenczy parolis pri stato de movado en Hungarujo. Trimembran delegacion ili intencas sendi al konferenco en Olomouc. Venontjare ili intencas organizi mezeŭropan esperantorenkontiĝon.

M. Neuwirth - Ni ne forgesu peti Asocion rezervi sufiĉe da loko en estonta gazetorgano por Junularo. Novobilský - demandis s-anon Mohapl ĉu en Doksy estis jam parolo pri gazeto kaj enhavo; ĉu MEM estos ankaŭ interessekcio. - Březina: s-ano el Žďár dankis por bone organizita SET.

Lička: el Ostrava informis nin kiuj s-anoj estis proponitaj por nova tutŝtata komitato.

Novobilský: estas strange, ke nur unu junul. delegito estis elektita en preparkomitaton.

Mohapl: Oni elektis du - s-anon Novobilský kaj Werner. Li konsentas kun opinio ke ni havu pli multe da anoj en centra komitato kaj instigis nin ke ni elektu pli multajn kandidatojn.

Novobilský: Junularo ne povas esti envicigita kiel interessekcio, ĉar laŭ regularo en interesesekcioj estas homoj kun aliaj intereso, uzantaj esperanton kiel ilon por alia celo. Sed junularo havas samajn interesojn. Ĉu estae alia ebleco envicigi nin en tutŝtatan asocion?

Mařík: Ni devas aferon pritrakti kun preparkomitato jam nun kaj klarigi ĉion en Olomouc.

Hořejší: Plzeň: kiel aspektos situacio kun kluboj kiuj ne estis envicigitaj en ROH aŭ ZK. -

Mohapl: Nova Asocio klopodos interveni ĉefe ĉe kulturdomoj, ke ni povu esti akceptitaj tie.

Echtner: proponas, ke ni elektu personojn kiuj agos kun preparkomitato pri junulara problemo. Afero estis ĉiuvoĉe akceptita kaj elektitaj estis: s-anoj Mařík, Echtner, Novobilský fari tion ĝis 20.8.1956.

Tichý: el Jihlava - K Junularo ne povas fariĝi „sekcio“, ĉar ĝi mem havas sekciojn.

Poste parolis regionaj delegitoj pri la situacio en unuopaj regionoj.

S-ano Vuk Echtner klarigis klasifikadon ĉe ekzamenoj kaj instruan kaj studnivelon en SET 56, kaj dankis al ĉiuj gefratoj de Solnický pri grandaj meritoj de SET aranĝoj. Li finis per entuziasmigaj vortoj. s. Schwetter informis pri la rezultoj de Internacia Tago de Infanoj (vidu aliloke en Tagiĝo.)

Mohapl: Denove estis presitaj lernolibroj de Kilian, ili estas riceveblaj ĉe Gusta Čepová, Olomouc II, Fibichova 25. Ĉiu povas ĝin mendi.

s. Novobilský finis per entuziasmigaj vortoj kaj s-ano Mařík fermis kunvenon per junulara himno "Ni Esperanta Junularo". Kunveno finiĝis je la 12-a horo. Sekvis komuna fotografiĝo.

Tutŝtata Esperanta konferenco

Olomouc 20-21.X.1956

TKKE informas: Estis aprobata propono, ke tutŝtata konferenco de esperantistoj okazu la 20.-21.10 en Olomouc kaj ke estu tien invitetaj ĝenerala sekretario de UEA - s-ano Dr Ivo Lapena, sekretario de Instituto de lingvosciencoj en Moskvo kaj prezidento de laborkomitato de sovetiaj esp.-istoj s. E.A.Bokarev kaj krome reprezentantoj de esperantistoj el Sovetunio, Pollando, Hungarujo, Bulgarujo, Rumunujo, Jugoslavio, Aŭstrio kaj delegitoj el Ĉina popola respubliko, kiuj sian ĉeeston jam promesis. Estas ankaŭ invitetaj delegitoj el Vietnamo kaj ĝenerala sekretario de MEM s. Balague. Sabate la 20-an de oktobro okazos la arta vespero kun riĉa artprogramo.

Komuniko de prepera komitato de tutŝtata Esp. konferenco:

Je la postulo de TKKE aranĝos E-rondetoj en Olomouc tutŝtatan konferencon la 20.-21.10.1956. Por organizo de tiu ĉi konferenco estis starigita speciala preparokomitato. Por ĉiuj partoprenantoj de konferenco estos prizorgita 20-25% rabato por fervojoj. Ĉiun pagon kiu rilatos la konferencon sendu per poŝt- aŭ ĉekpagilo al konto: Státní spořitelna v Olomouci, sm. č. 1100-1, úč.č. 237-247, por konto 020-1001 (Esperanto). Al eventualaj skribaj demandoj rilatantaj la konferencon, aldonu ĉiam afrankitan koverton je la respondo.

Organizaj konsiloj:

Al ĉiuj partoprenintoj de konferenco, kiuj aliĝos plej malfrue ĝis sabato la 22.9.1956 estos prizorgita fervojrabato kaj garantiita enirbileto por la sabata Arta vespero kaj tranokto el sabato je dimanĉo en hoteloj kaj komunaj tranoktejoj. Aliĝiloj kiuj atingos nin post la 22-a de septembro ni ne povas garanti la tranoktadon. - Al la ĝustatempe aliĝintaj oni forsendos ĝis sabato 6.10.1956: la konferencan legitimilon, fervojrabatilon, aprobon de tranoktado, bileton por Arta vespero kaj informsciigojn. Eventualajn reklamaciojn de notitaj dokumentoj faru tuj post tiu ĉi dato, por ke ili povu esti ĝustatempe prizorgitaj.

Viajn aliĝilojn por ĉio ni aprobas nur post alsendo de antaŭpago. Aliĝilojn direktu al: s.Jar.Karhan, Olomouc, Na Hradě 2.

En viaj aliĝiloj citu: Přihlašuji se závazně k účasti na konferenci v Olomouci 20.-21.10.56, Jsem členem esper. kroužku při v a esperantistou od roku..... Současně poukazuji poštovní poukázkou (na adr. Jar. Karhan) 1. konferenční poplatek Kčs 8,-, 2.vstupné na Arta vespero Kčs 5,-, 3 zálohu na ubytování ze soboty na neděli a) v hotelu Kčs 12,-, b) ve spol. noclehárně Kčs 6,-

Žádám o zajištění: oběda, večere v sobotu, oběda, večere v neděli. Uveďte jméno a příjmení a přesnou adresu.

Dimanĉe antaŭ la Tutŝtata E-konferenco je la 8-a horo ni intencas aranĝi mallongan Junularan interkonsiliĝon por pritrakti ankoraŭ kelkajn necesajn aferojn. Nia Junularo venu grandnombre al la Konferenco, kiu havos historian signifon! Aliĝu tuj por ricevi fervojrabaton! En la komitanon de la landa asocio ni volas kandidatiĝi (membrojn kaj anstataŭantojn): Vl.Novobilský, J. Werner, J.Kuzník, J.Solnický, Dr.Kočvara, Vl.Novotný a M.Matušková, J.Pastor, Pavel Tichý.

Tagiĝo informas

La Tutpollanda Kongreso

okazos 27.-28.-an de oktobro 1956 en Varsovio, komunikas al esperantistoj "Bulteno" de Asocio de Esp. en Pollando. Invitoj al eksterlandaj esperantistoj estis senditaj.

Regiona kunveno de esperantistoj en Ostrava

okazis la 23-an de septembro 1956 en uzina klubo ĉe VŽKG. Programo rilatis la okazontan Tutŝtatan Esp. Konferencon en Olomouc.

D-ro Stan. KAMARÝT mortis.

Kiam ni restadis en la Somera Esperantista Tendaro, atingis nin sciigo pri la morto de D-ro Stan. Kamarýt, kiu okazis 30-an de julio 1956. La neatendita informo surprizis ĉiujn.

La morto de D-ro Kamarýt signifas grandan perdon por ĉeĥoslovaka kaj tutmonda Esperantomovadoj. Li staris ĉe la lulilo de la movado inter ĉeĥoj kaj tiun ĉi pioniron kaj veteranon distingis bela kvalito: dum sia tuta vivo li fidele, oferplene kaj celkonscie laboris por la movado. La movado rekonis liajn kvalitojn kaj meritojn per la plej altaj distingoj: li estis honora membro de UEA kaj membro de la Akademio.

La ĉeĥoslovaka esperantista junularo perdas en la mortinto bonan amikon. Ni fieras, ke estis Junulara iniciato (de SET 1954), kiun D-ro Kamarýt tre afable plenumis, verkinte detalan historion de la ĉeĥoslovaka Esperanto movado. Li skribis al ni, ke li deziras vidi foje sian verkon eldonita prese. Li ne ĝisvivis la eldonon.

D-ro Stanislav Kamarýt mortis. Sed, laŭ la vortoj de la poeto,
lia verk' al venk' signalu!

El la vivo de niaj grupoj.

En la grupoj finiĝis en junio unu jaro de aktiveco, kiu estis eĉ tre kontentiga en 4-5 lokoj, kie agas sindonemaj junaj gesamideanoj. Nia celo estas, ke pri ĉiuj grupoj ni povu raporti ke ili vigle laboras. La nova aŭtuna sezono post la refondo de landa esp. organizo certe signifos la komencon de grava revigliĝo de la tuta movado kaj same de la junulara.

La junularo espereble partoprenos grandnombre la tutŝtatan konferencon en Olomouc.

Laŭregiona rigardo je la grupa aktiveco en majo-junio donas jenan bildon:

En la junulara rondo de EK Praha daŭris la normala vivo. Dum la ferioj pro foresto de studentoj ĝi ne kunvenas aparte, sed merkrede kun la Klubo. Kelkaj povis ĝui ĉeeston de pluraj fremduloj, inter kiuj junaj estis f-ino Vilkki el Finnlando kaj delegitoj de la studenta mondkongreso Satoŝi Ueda (Japanio) kaj René Charel (Francio). En Karlovy Vary la grupo bone agas kaj la urba domo de kulturo promesis subtenon ankaŭ financan kaj eblecon eldoni prospektojn pri la banurbo. En Písek la kunvenoj okazis neregule, 15.6. kun interesa rakontado de inĝ. Krajíc. Montrofenestro sur ĉefplaco helpas en la propagando. La reg. delegito Křivánek vojaĝis Albanion. Plzeň regule kunvenadis escepte de ferioj, prizorgis propag. kesteton kaj helpis pretigon de "Pacdefendanto". Lanškroun (laŭ okaza informo de Jan Werner) ŝajnas ke la grupo iom aktiviĝos. Tri kursoj estas planataj kaj eble okazos elementaj kursoj en la vilaĝoj Dolní Čermná kaj Herbortice. Montriĝis intereso pri Esp-o en la distrikta komitato de ĈSM (Junulara Ligo). J. Werner prilaboros la terenon en Třebovice v Čechách aŭ en Č.Třebová por E-kursoj. Č.Třebová estus bona loko por orientbohemiaj renkontiĝoj. En Brno la junularo, fininte kun bona sukceso la agadjaron kaj havinte bonajn programojn ankaŭ en la klubo ne havas apartajn kunvenojn dum la feritempo, kunvenante en la Klubo. Pluraj membroj pasigis la libertempon en la Somera Tendaro. Kelkaj el la programoj estas haveblaj ĉe RD Olda Kaláb, Dolnopolní 41. La Junularo adiaŭis al sia elstara laboranto Josef Cink, kiu eminente fininte la studojn profesoriĝis en Přerov. Ĝi kore dankas al s-ano Cink pro modela laboro por la grupo. En Jihlava fondiĝis 14.6. rondeto (ĉu junulara?) ĉe Regiona Domo de Kulturo, kun 12 membroj, kiuj kunvenas ĵaŭde 18 h en Dům osvěty, Žižkova 15. Mucha gvidos kurson aŭtune. En Kroměříž la agado ne pliboniĝis post la elekto de nova loka delegito. Raporto venas apenaŭ kvaronjare. RD promesas helpon al la grupo. Svitavy ne raportis, sed niascie oni restis sama vigla.

Zorgon kaŭzis al ni la lastatempa stato en Třebíč. Pasintjare ĝi aranĝis tutŝtatan tendaron esperantistan, "Jiskra" aperigis grandan artikolon, ke Třebíč estas "verda stacio", kiu sukcese aranĝis regionan konferencon junularan kaj subite la RD havas kaŭzon por admoni la grupon, konstatante i.a. nebonan lingvan nivelon, kvankam ankaŭ tie estas laboremaj junuloj. Kaj freŝa okaza letero al ĈD sciigas, ke „ĉiuj knaboj post reorganizo de la rondeto forlasis Esp-on kaj restis nur kelkaj junulinoj". Por neinformita homo ĝi ne estas komprenebla. Ankaŭ ni ne konas plene la cirkonstancojn, sed ni povas diri, ke la rondo ne havis sanan bazon se aliĝo al Esperanto estis por plejmulto - grandnombre infanoj - nur rimedo por partopreni en interesa societa vivo. Ni volus pli detale analizi la kazon por lerni de la malsukceso kaj eviti ripetigon, ankaŭ aliloke kaj tiucele ni bezonas klarigon de la restintaj fidelulinoj. Ni fidus vin, samideaninoj, ke vi klopodos meti solidan bazon por la reorganizita grupo kaj pensante pri vi ni deziras al vi paciencon kaj plenan sukceson!

La grupo en Žďár n.Sáz. ŝajnas plej vigla en la regiono. Kursoj A kaj B sukcese finiĝis en junio kaj la kursanoj korespondas, legas, lernas esp. kantojn kaj ludojn. La grupo ricevis subvencion de la Domo de Kulturo. La Junularo en Olomouc daŭrigis elementan kurson; kunvenoj variigitaj per legado de literatura verko; korespondado de la membroj riĉe plivastiĝis; siajn muskolojn oni utile

trejnis per "brigad"-laboro en urba parko. RD Šimeček promesas ekkontakti kun la grupoj en la regiono.

El la regiono Ostrava ne atingis nin la regula raporto. La esp. vivo tamen plene pulsas tie. Opava estis absorbita de la organizado de SET. Ostrava komencos 12.9.1956 du kursojn. El Ostrava 10 junularanoj partoprenis SET.

SLOVAKIO

S-anoj M. Zvara kaj J. Slivka raportis:

Pro la ferioj ĉesis en Bratislava regulaj kunvenoj de la junulara grupo kun prelegoj, oratora kurso ktp. kaj gejunuloj kunvenas tiutempe merkrede por kanti kaj ludi (ĉ.12 s-anoj el 22). Aŭtuna kurso estas planita. Oni forte kunlaboras al Kleriga Centro (sekve la rondeto en Poprad ekfunkciis) kaj la gazetoj Smena, Pravda, Práca enpresis artikolojn pri Esp.-o. - Eksgrupano de Bratislava, s-ano Krajník, vikle eklaboris en Gelnica, kontaktas kun 4 s-anoj kaj volas fondi grupeton.-- Post kelkaj jaroj ni reaŭdas pri s-ano d-ro I.Havaš, instruisto en Hont.Tesárky, kiu klopodas venigi al la Junulara Mondfestivalo en Moskva danc- kaj kant-rondeton de sia lernejo, lernonta Esp-on laŭ leningrada alvoko. Rondeto en Košice kunvenadis en lernejo, nun ne pro manko de ejo, kiun oni ne sukcesis akiri. En Martin oni kunvenas regule kaj laboras ekzemplodone. La rondeto en Poprad, post la disigo, denove kunvenas de 29.6 merkrede 19 h en K-D. La KulturDomo jam traktas ĝin favore (post intervenoj). Partoprenas 4-12 ges-anoj sub gvido de M.Neubeler. Propag.montroŝranko informas la publikon. La rondeto ekskursis en Slovaka Paradizo. Du kursoj komencotaj aŭtune. En Prakovce oni ne kunvenas regule: laŭ "Pacdefendanto" okazas tie kurso. En Spíš.N.Ves kunvenas 19 h 4-8 plejparte iom aĝaj s-anoj. La rondeto en Svit estas traktata jam pli favore. Kunvenoj jaŭde 19 h, 5-6 ĉeestantoj. S-anino Kaczorová verŝajne forlasos Svit, ankaŭ la agema estro Vilka. Klopodo fondi E-grupon ĉe altlernejo en Zvolen malsukcesis. Tamen ekzistas grupo de Kleriga Domo (informo mankas). En Žilina fondiĝis esp. rondeto ĉe KV-KSS (regiona komitato partia) kaj la kamaradoj havas viglan intereson. J.Mařík (4.IX.)

Pri la jubileo de urbo Svitavy en fremdlando

estas titolo de la longa artikolo publikigita fare de Svitavaj s-anoj en gazeto "Rovnost" 3.7.1956 en la rubriko: "Malgranda kroniko de niaj distriktoj". Oni skribas tie krom alio:

"Apud la entreprena klubo "Svitap" estas rondeto de esperantistoj, kiu pri sia urbo kaj ĝia vivo skribis al siaj amikoj en fremdlando. El foraj landoj baldaŭ post tio venis al Svitavy sinceraj bondeziroj kaj varmaj salutoj. Venis salutoj el Meksikio, Kalifornio, de fama vojaĝisto Jos. Scherer, kiu konas nian landon de sia persona vizito. Plue el Leipcigo, el Danlando, Japanujo, Bulgarujo kaj de multaj aliaj. Gazeto notas ĉi tie fragmentojn el iliaj leteroj. En ĉiuj tiuj salutoj el foraj kaj proksimaj landoj sonas unu sola voĉo: "Paco kaj amikeco: Konsilantaro de nacia komitato en Svitavy decidis respondi je ĉiuj bondeziroj en nomo de ĉiuj civitanoj el la urbo. Al ĉiu letero estos aldonita solena insigno: 700 jaroj de urbo Svitavy kaj pluaj aldonoj."

Jen ekzemplo de bona kaj utila propagando por nia afero.

Voĉo el Sudbohemio.

Alveninte en Klatovy mi klopodis enkontaktiĝi kun iuj gesamideanoj. Post longa tempo mi sukcesis en tiu direkto, sed la rezulto ne estas ĝojiga.

En la jaro 1950 okazis en Klatovy Esp. kurso, kiun gvidis unu profesoro el komerca lernejo; samtempe ankaŭ li lernis Esperanton. La kurson absolvis ĉirkaŭ 20 personoj. Per tiu ago finis ĉia Esp.movado. Bedaŭrinde ĉiuj absolventoj estas homoj maljunaj. En la diskuto pri Esperanto mi aŭdis jenon:

Gvidaj aŭtoritatuloj ne favoras Esperanton. Laŭ ilia opinio: "Esperanto povus eble ekzisti sub iu falsa firmo. Neniu riskus kunveni sen rajtigilo. Kaj fine Esperanto povus servi eble al filatelistoj. Tiuj konas ĉiuj ian fremdan lingvon, kiu ebligas al ili interkorespondadon. Do Esperanto estas superflua."

Mi ne opinias la aferon finita kaj kredas ke ankaŭ Klatovy verdiĝos. Zdeněk Závodný.

Banloko KARLOVY VARY.

Gazeto "Karlovarský lázeňský časopis" havas jam sian regulan anguleton pri la Esp. vivo en tiu fame konata banloko.

En la 7-a kaj 8-a N-ro de gazeto: Karlovarský lázeňský časopis oni povas legi informajn artikolojn pri Esperanto, ĝiaj sukcesoj kaj pri la Esp. vivo en K. Vary. Plue oni alportas informojn pri la fremdlandaj vizitoj de Esp. en tiu ĉi loko. Oni ankaŭ atentigas la legantojn ke oktobre okazos tutŝtate konferenco de esp-istoj en Olomouc, kie estos fondita nova Esp. Asocio en nia lando.

Esperanto iom post iom trapenetas la publikan vivon pere de ĉeĥaj gazetoj. Speguliĝas ĉi tie bona laboro de esp.-istoj el Karlovy Vary.

INTERBABILADO en O S T R A V A

Post longa pridiskuto kun ĉiuj anoj de nia klubo ni decidis anstataŭ aŭtuna Junulara Interbabilado aranĝi grandnombran ĉeeston en Olomouc, kie okazos tutŝtata konferenco. Ĝi estos grandskala festa konferenco, ĉar tie okazos fondiĝo de nova Esp.Asocio. Tie ni montros al tuta mondo junularan forton kaj aktivecon, kiu estas garantio de plej bona estonteco de Esp.movado en ĈSR.

Do ni apelacias je ĉiuj junularaj grupoj:

Alvenu multnombre al Olomouc kaj helpu al naskiĝo de nova Asocio.

Ostrava Junularo

-o-

Konkurso inter faklernejoj OUPZ en Třinec Příbor kaj Ostrava

Ni sentis en Třinec neceson iel ekagi inter junularo kaj precipe en faka lernejo, kaj vekigi inter ili intereson pri Esperanto. Mi turnis min al vicdirektoro de Faka lernejo (OUPZ 16) kun demando, ĉu lernejestro ne havus riproĉojn fondi por lernantoj tie E-kurson. Ĉar ili konsentis mi tuj prizorgis informan materialon por murgazeto. Inter alia mi uzis mensogon, ke OUPZ 11 kaj 17 el Ostrava kaj Příbor alvokas OUPZ 16 por konkurso varbi por Esp. kurso kiel eble plej multan anaron.

Tial mi petas, ke same faru s-anoj en Ostrava kaj Příbor kaj instigu lernantojn en OUPZ de tiuj lokoj al la sama ago. Mi esperaa ke tuta afero sukcesos kaj tiel ni kreas pluajn fortajn ĉelojn en niaj lokoj.

Pomykacz – Třinec

Internacia tago de infanoj en Dolní Bludovice vere internacia!

ĉi jara estis la internacia tago de infanoj en D.Bludovice en okjara mezlernejo vere internacia. Helpe de Esperanto-rondeto efektiviĝis Lerneja korpeduka unuiĝo, okaze de tiu ĉi tago, la malpezatletikan maĉon je malproksimo inter 10 eksterlandaj lernejoj. Esperanto-rondeto helpis peri kontakton inter nia kaj eksterlandaj lernejoj. Tuta korespondado okazis sole en Esperanto. Al nia alvoko aliĝis lernejoj el Anglujo, Germana dem. respubliko, Hungarujo (2 lernejoj), Vietnamo popola respubliko (5 lernejoj) Do entute, kun la nia lernejo, 10, kiujn reprezentis 120 gelernantojn (46 knabinoj, 74 knaboj).

Inter niaj gekolegoj estis granda intereso pri tiu ĉi maĉo kaj ancorau pli granda intereeo eatia inter niaj gelernantoj. Alveno de ĉiu letero estis akompanita kun granda scivolemo. Ĝi estis tuj tradukita kaj ĉio estis elsendita pere de nia lerneja disaŭdigilo. La alvenitaj rezultoj estis tuj poentitaj, por ke ni sciu kiel aspektas nia pozicio.

En Freital (GDR), dum la internacia tago de infanoj antaŭ la Pestalozzi-lernejo kaj en la najbara pionira sportejo flirtis apud la germana flago ankaŭ la flago de amikiĝanta ĈSR. Vespere sekvis lampiona procesio tra la urbo. Tiu ĉi lernejo sendis por plej bona knabo kaj plej bona knabino el ĉiu lernejo sportinsignojn "Ĉiam preta por la paco kaj mondamikeco". En Pécs (Hungario) la konkurso aranĝis la urba T.S.B. (sportkomitato) kaj partoprenis ĝin ok lernejoj. En Hanoi (Vietnamo) vetbatalis kvin lernejoj. La maĉo okazis sur la Urba Stadiono en Hanoi. Post la revumarŝo de 1.500 pioniroj sekvis la konkurso meze de tondra aplaŭdo de 5.000 etaj ĉeestantoj. En Dolní Bludovice (Ĉeĥoslovakio) la festo komencis per infana procesio kiun partoprenis 500 gelernantoj de ĉeĥa kaj pola lernejo. En la frunto de la infana procesio oni portis krom ĉeĥosl.,

sovetunia kaj pola ankaŭ Esperantan flagon. Antaŭ la vetbatalo dancis geknaboj el infanvartejo, infanajn dancetojn laŭ melodioj de naciaj kantoj.

Rezulto de la maĉo: (Ni publikigas nur la unuajn el ĉiu kategorio)

Knabaj teamoj:

- | | |
|---|-------------|
| 1. Temple Boys School, Rochester, Anglujo | 1082 poent. |
| 4. Osmiletá stř. šk.v D. Bludovicích ĈSR | 890 poent. |

Knabinaj teamoj:

- | | |
|-----------------------------|-------------|
| 1. Lernejo-Freital, GDR | 1097 poent. |
| 3. Lernejo - Bludovice, ĈSR | 981 poent. |

Unuopuloj - Knaboj:

- | | |
|--------------------------|--------|
| 1. Werner, Dressler, GDR | 202 p. |
| 8. J. Kulhánek, ĈSR | 172 p. |

Longsalto: - Edward Broad, Anglujo 475 cm

kuro: - Malcolm Hughes, Anglujo 8,2 sec.

kriketpilko:— David Sellen, Anglujo 68,09 m

Unuopuloj - knabinoj:

- | | |
|--------------------------|------------|
| 1. Gabriele Lehmann, GDR | 215 poent. |
| 5. M.Kavalcová, ĈSR | 183 poent. |

longsalto: - M. Kovacevicz, Hungarujo 420 cm

kuro:- M. Kovacevics, Hung. 8,9 sec.

kriketpilko:- G. Lehmann, GDR 48,77 m

La internacia tago de infanoj jam antaŭ longe finiĝis. Ne restis sole sportrezultoj, venkintoj kaj malvenkintoj sed restis ankaŭ belaj rememoroj kaj precipe bela impresio, ke ni akiris novajn bonajn amikojn. Certe ni ne povus erari kiam ni diros, ke ni helpis al interfratiĝo de niaj nacioj kaj al plifirmigo de la paco en la tuta mondo. Kaj tion ebligis ESPERANTO.

Oldřich Schwetter, instruisto.

Saluto de la ĉina parlamentano Hu Yu Zhi.

Al Tutŝtata Junulara Jarkunveno en ĈSR

Praha, 2.7.1956.

Estimataj kaj karaj gesamideanoj!

Dank' al Esperanto mi havas la feliĉon kaj honoron kontakti kun vi, Ĉeĥoslovaka Esp. Junularo.

Malgraŭ larĝa distanco inter niaj du patrujoj, la popoloj ĉeĥoslovaka kaj ĉina estas tre intimaj amikoj kaj fratoj. Ni kune laboradas kaj bataladas por konstrui socialismon en niaj propraj patrujoj kaj gardadi pacon en la mondo. Dum pasintaj jaroj jam tre ofte ĉinaj gejunuloj vizitadis vian landon kaj ĉeĥoslovakaj gejunuloj vizitadis nian landon. Nur diferenco de nacilingvo malhelpas la kunlaboron kaj kunligiĝon inter ni, ĉu ne? Estas tre bone, ke ni, la ĉeĥoslovakaj kaj ĉinaj junuloj, lernadas kaj uzadas Esperanton, la helpan lingvon internacian. Mi kredas, ke per Esperanto la amikeco kaj kultura kontakto inter ĉina kaj ĉeĥoslovakaj junularoj pli multege kaj pli rapide progresos.

En nomo de ĉina Esperantistaro kaj ankaŭ en nomo de ĉina junularo mi nun sendas al via jarkunveno tutkoran kaj fratecan saluton kaj deziras al vi, ĉiuj gesamideanoj, bonan sanon kaj sukceson en laborado kaj lernado.

Vivu la ĉeĥoslovaka Junularo!

Vivu amikeco inter ĉina kaj ĉeĥoslovaka popoloj!

Vivu socialismo kaj paco!

Hujucz (p.m.)
(parlamentano de ĈPR)

Leteroj de amikoj

..koran dankon pro via invito viziti la Someran Junularan Tendaron. La alsenditan de vi ĵurnalon ni tralegis kun grandega intereso. Bonvolu skribi kiaj preparaj aranĝoj por Tutmonda Junulara Festivalo 1957 en Moskva fariĝas nun en via lando aŭ en via urbo... Esperanto-Sekcio de Domo de Kulturo, Leningrad.

..ni partoprenantoj de la II-a Hungarlanda Esperantista Renkontiĝo en Budapeŝt kore salutas vin kaj la karajn legantojn de „Tagiĝo”. Budapeŝt.

.....via Tagiĝo n-ro 31 tre multe ĝojigis nin. La riĉa enhavo estas instrua! Via revuo ekzistu kaj progresu! La junularo estas gravega por nia kulturmovado. Ni ankaŭ klopodas interesigi gejunulojn. La konstanta alsendo de via revuo donas bonan sperton. Mi mencias ĝin en nia hungarlingva bulteneto. Vere meritas dankon tiuj, kiuj en malfacilaj tempoj ĉe vi kaj ĉe ni kuraĝe tenis la movadon kaj organizis ion...

Pál Balkányi, Budapeŝt

..mi ricevis vian karan gazeton Tagiĝo, por kiu mi dankas al vi. Al via Junular-kunveno en Hradec mi deziras multan sukceson. Sincere salutas vin la Esp. grupo en Békesczaba.

J.Valastyán, sekr. de E-grupo

En Anglujo oni preparas por Moskva festivalo 1957.

En Mideleseks komenciĝis du kursoj por partoprenantoj de festivalo en Moskvo. - Se ni povus fari tiel ĉie, Esperanto nepre estus unu el la oficialaj lingvoj de la festivalo. Unu paŝo farebla kaj farenda estus postuli en la internacia organo de la Mond-federacio de Demokrata Junularo "Monda Junularo" Esperanto lecionojn.

(el la letero de s.Ronald Lynn - Anglujo)

Salutletero el Internacia Junularkunveno de TEJO.

Karaj geamikoj! Akceptu multajn salutojn de la 12a mondkunveno de junaj Esperantistoj, kiu okazas de 28.7.-4.8 en la bela banloko nordmara Büsum. Ĉi tie kunestas 300 gejunuloj el diversaj landoj. Ili parolas nur unu lingvon, Esperanton, kaj komprenas unu ia alian bonege. Nia saluto instigu vin, por ke ankaŭ ĉe vi la Esperanto movado pli fortiĝu. (Sekvas subskriboj de samideanoj el 17 landoj)

..post ricevo de Tagiĝo 31 mi estas ĝojige surprizita. Laŭ enhavo ĝi estas tre interesa ne nur por junularo sed ankaŭ pli aĝaj trovos en ĝi refreŝiĝon. Scienca artikoleto aŭ informo tute ne superflua. Laŭ mia opinio, kiam la gazeto povos esti jam presita, certe ĉio pliampleksiĝos kaj pliboniĝos. Al plua laboro mi povas kaj volas nur bondeziri

T. M. Bohun, Nová Paka.

Somera Esperantista Tendaro eb ĈSR fariĝis internacia

15.7. - 11.8, plensukcese efektiviĝis en Ĉeĥoslovakio la V-a Somera Esperantista Tendaro de la ĉeĥoslovaka junularo (SET) zorge de la Esperanto-Fako de Domo de Kulturo Petr Bezruč en Opava. SET estas la unua tiuspeca edukejo en la mondo kaj inter la esperantista junularo en ĈSR ĝi estas tre populara. 90 partoprenantoj (po 45 en du etapoj) studis antaŭtagmeze Esperanton kaj ĝiajn literaturon kaj historion en kvar laŭgradaj kursoj (de la elementa ĝis la instruista) por fine subiĝi al ekzamanoj. La frekventintoj ricevis bele presitan diplomon kun noto pri la studprospero. Dum la studo oni utiligis je la unua fojo la ĵus multobligitan "Resuman historion de la Esperanto Movado", kiu sur 40 paĝoj dense skribitaj de la formato A-4 donas koncize la tutan historion de Esperanto, de la movado tutmonda, ĉeĥoslovaka kaj junulara. Verkis ĝin la instruanto pri historio en SET, ĉefdelegito de la Esp.Junularo en ĈSR Jaroslav Mařík, estinta ĝenerala sekretario de EAĈSR kaj ekskomitatano de UEA. (La SET-instruanto pri literaturo, kulturdelegito de EJ-ĈSR Vlastimil Novobilský, verkas nun similan broŝuron pri la Esperanta Literaturo). Pri la nivelo de la kursoj atestas ekz., ke la studmaterialo pri literaturo kaj historio estis multe pli ampleksa ol tiu de la iama ŝtata ekzameno pri Esperanto, kaj plue letero de Gustav Nilsson, asistanto de la Reĝa teknika altlernejo en Stokholmo, kiu vivis unu semajnon en SET.: "Mi ne povis imagi ke la kursoj havas tiel

altan nivelon. Mi klopodos laŭvice sendi al SET miajn infanojn, ĉar ĝi certe en eduka rilato estas pli valora ol multaj oficialaj lernejoj ĉe ni (en Svedlando)", Instruis Echtner, Mařík, Novobilský, Novotný kaj Kočvara. Antaŭtagmeze, post la veksignalo, korpekzerciĝo, ordigo en la tendoj, sinlavo, hiso de la flago kaj matenmanĝo, okazis tri ĝis kvar lecionoj en ĉiuj kursoj. Post la tagmanĝo sekvis ripozo kaj poste sportoj, baniĝo, ludoj, ekskursoj en la bela arbara regiono, tre ofte kantado kaj lerno de novaj Esperantaj kantoj, konversacio kaj kelkfoje arbohakado por la tendaraj kuirejo kaj vespera fajro. Aŭtoĉara rondveturo 360 km tra Silezio montris al la tendaranoj la belaĵojn de tiu regiono. Belaj estis precipe la kunsidoj ĉirkaŭ la tendara fajro kun kantoj, skeĉoj, ludoj ktp.

La nunjara SET fariĝis unuafoje internacia pro ĉeato de eksterlandanoj: de Imre Ferenczy, junulara sekretario de Hungarlanda Esperanto Konsilantaro kaj oficiala delegito de HEK, de juna instruisto nederlanda Henk Saalting kaj de G.Nilsson el Svedlando. Sekve de tio kvin flagetoj flirtis apud la verda stelo sur la tendara pordego: la ĉeĥoslovaka, Esperanta, hungara, nederlanda kaj sveda.

La tendaro en profundaj arbaroj apud Žimrovice konsistis el 22 litotendoj kaj krom kutimaj aferoj (kuirejo, subĉiela manĝejo, kelo ŝlosebla, deponejo k.a.) ĝi posedis ankaŭ volibalejon, riverbanejon, malgrandan bibliotekon kaj...telefonon. La fervojo donis 50% rabaton por la veturpreze.

Kvankam fore de la cetera mondo, la tendaranoj estis spirite ligataj kun la tutmonda movado, pri kiu ili tiel multe lernis.

Dum la solena momento en Kopenhago ĉiuj tendaranoj viciĝis sur la tendarplaco ĉirkaŭ la flagomasto kaj tondra saluto diseĥis inter la deklivoj de larivervalo: "Al la 41-a Universala Kongreso de Esperanto, nun malfeamata en Kopenhago, hura, huraaa!" Dum alia viciĝo la tendaro honorigis la memoron de la meritplena pioniro kaj veterano de la movado D-ro St.Kamarýt, kiam venia informo pri lia subita morto.

SET estis vizitata de aliaj junularaj (pioniraj) tendaroj kaj okazis kulturprogramaj konkursoj inter ambaŭ partioj, ĉirkaŭ la tendara fajro. La vizitantoj eĉ ellernis mallongajn Esperantajn kantojn. Radio Ostrava raportis pri tiu ĉi interesaĵo. Ankaŭ la ĉefa ĵurnalo hungara Szabad Nép menciis pri SET sur 1-a paĝo.

Jen nova, alloga maniero por interesigi la junularon pri Esperanto. Ni kredas, ke tia aranĝo estas rekomendita ankaŭ por aliaj landoj. SET eĉ devis rifuzi plurajn partoprenantojn pro manko de loko. Al la junularo en Opava apartenas nia komuna danko pro la oferplena kaj zorga preparo de tiu ĉi aranĝo.

Kiam oni malkonstruis la tendojn kaj la tendaro malaperis, la herbejo inter la arbardeklivoj ŝajnis tiel malplena, malĝoja . . . Venis la momento de la lasta faro: adiaŭa parolo kaj malhisio definitiva de la flago. Ni komprenas, junaj gesamideanoj, la malgajon de viaj vizaĝoj. Ni komprenas ankaŭ kelkajn larmojn, kiujn ni vidis... Ni konsolu nin per la espero revidiĝi en la VI-a Somera Esperantista Tendaro!

Partopreninto.

Kelkvorte nur

pri la Somera Esperanta Tendaro 1956, ĉi nekontesteble estis denove brila demonstracio de fervoro kaj solidareco de la plej junaj Kavaliroj de la Verda Stelo. Tio ne estas nur parada frazo - ne estas vortoj troigaj. Dirante ilin, mi turnas min precipe al vi, miaj sam-, aŭ pli aĝaj kunplugantoj de la Sulko, kaj mi esprimas bedaŭron, ke preskaŭ neniu el vi (krom unu-du pli-malpli kompetentaj) venis por vidi mem. Mi partoprenis ĉi-jara la trian fojon - sed ĝis nun mi vane serĉas solvon por psikologia analizo de SET ĉeĥoslovaka, de ĝia spirito, konstitucio. Dum la obskura tempoperiodo, kiam estis forvelkanta lace jen unu, jen alia branĉo de nia varta laboro sur la Esperanto-kampo, tiam el sub la muskotavolo jam kelkloke kovranta ĝin elkreskis nova, tipa, strange fortika markoto. (Certe iel simile ĝin karakterizis poeto, kio cetere ja okazis jam). Kaj nun kiam la obskuraj nebuloj definitiva disigas kaj la pulso-spiro en la enlanda movado fariĝas pli facila kaj pli rapida, ankaŭ la nova floro ekvivas alian vivon.

(daŭrigo de la artikolo „Kelkvorte nur“)

SET ĉi-jare fariĝis ISET

"I" signifas "Internacia". Apenaŭ vi kredus, kiom forte influas la situacion, la vivon de SET tiu ŝajne senkulpeta kompletigo. Kun miaj iom pli spertaj, pli aĝaj okuloj, mi, karaj junaj kavaliroj, vidis - ĉar volis vidi - iom pli ol vi, kaj min jam ofte ruligis tra la kapo pensojn pri la situacio kaj plua vivo, kaj la rolo de SET - ISET. Via gajeco, via juneca, facila animo dum la iam petola vivoformo en la tendaro ne jam perceptis, kio novaperis en ĝi. Dum mi sidis, vagis inter vi, ĉiutage denove, sen kontrolado, sen kritikado, spontanee venis al mi la nova pulsado. Estis novaj aperaĵoj, jen bon-, jen malbon-aŭguraj.

Artikoleto "Kelkvorte nur...", same Tagiĝo kelkpaĝa nur, ne permesas diskuton detalan, sed vi havu sufiĉe da pacienco, tempo, sindono, respondecado kaj disciplino por studi kaj solvi viajn SET-problemojn, kiuj - mi asertas denove - estas fakta iom aliaj, novaj, ne nur pro la "I-ŝanĝo", sed ankaŭ, kaj eĉ pli, pro la radike nova situacio de la movado en ĈSR kaj Orienta Eŭropo, en la tuta mondo.

De unu juna lango venis vortoj de dubo pri plua okazigo de SET. Miaj karaj junaj amikoj, ne plu estas eble eskapi. Nun ne plu estas eble eĉ nur imagi, ke povus pasi unu jaro sen SET-ISET.

ISET estas nepre neevitebla en ĉiuj pluaj jaroj de nialanda aktiva poresperanta laboro. Via tasko! Via granda pagenda ŝuldo de samideana solidareco, al la granda Esperanto-komunumo tutmonda, al la heredaĵo de Zamenhof!

Vuk Echtner.

Internacia reciproka vizito.

Multan tempon ni dediĉis por pridiskuti plibonigojn de SET 1957. Inter diversaj proponoj pri ŝanĝo de horordo kaj enhavo de instru-horoj estis proponita plej interesa propono, kiu rilatas vin. Venontjare ni volas pli intensive kunlabori kun iu aktiva junulara fremdlanda grupo. Kaj somere. organizi reciprokan interŝanĝon de almenaŭ 20 gejunuloj. Speciala komitato kiun ni devus elekti por zorgi pri tiu afero, pritraktus ĉiujn necesojn kun oficoj. Valutaj malfacilaĵoj nuligis tiamaniere, ke monon de ĉeĥoslovaka grupo oni donus al SET por kompensi elspezojn de fremdlandaj gastoj. Same farus fremdlanda tendarestraro.

Ĉefa kondiĉo por partopreni junularan interŝanĝon estos lingva scio, kaj aktiveco en movado. Dum tuta jaro vi povas fari miraklojn.

Do junularo: Ek al laboro!!

Ostrava JUNULARO.

Letero de blindaj samideanoj el Jugoslavio.

..ni akceptis Vian afablan leteron, per kiu vi intencas inviti niajn blindajn esperantistojn partopreni la someran E-tendaron proksime de Opava.

Via afabla invito nin tre ĝojigis, sed bedaŭrinde via ŝatata letero alvenis tro malfrue kaj ne estus eble tiel rapide prizorgi viziojn kaj pasportojn.

Sed ni firme esperas, ke estonte, se venos via invito ĝustatempe, niaj blindaj esperantistoj havos okazon viziti vin, interkonatiĝi kun vi kaj interŝanĝi spertojn. Laŭ nia opinio ĉi tiuj kontaktoj estas tre utilaj kaj fruktodonaj.

Mi petas vin, akceptu de ĉiuj blindaj esperantistoj el nia lando elkorajn kaj kamaradajn salutojn kaj la plej belajn dezirojn, ke via tendaro plene sukcesu kaj estu utila al vi ĉiuj.

Stevan Uzelac-Beograd

Kion skribis

la fremdaj partoprenintoj de SET...

Gustav Nilsson, kemiisto en la Reĝa Teknika Altlernejo en Stockholm, skribis al ni pri SET post unusemajna travivo tie:

"Kvankam mi nun sidas en tiu ĉi laŭdire komforta A-hotelo (Palace en Praha) miaj pensoj ofte flugas al Via efektive komforta A-tendaro (mi petas ne miskomprenu la vorton!). Mi ofte jam havis okazon bedaŭri, ke mi ne tute simple partoprenis tie tutan kurson kiel lernanto kaj lignaĵhakisto! Mi ne povis imagi, ke la kursoj havas tiel altan nivelon. Se mi ne plu havos okazan partopreni Someran E-Tendaron en via lando, mi almenaŭ klopodos laŭvice sendi miajn infanojn tien, ĉar ĝi certe en eduka rilato estas pli valora ol multaj oficialaj lernejoj ĉe ni."

- o -

Imre Ferenczy, junulara sekretario de Hungarlanda Esperanto konsilantaro.

Kun granda ĝojo mi akceptis la oficialan inviton de TKKE por partopreni ĉijare la Junularan E.konferencon kaj Someran Esperantistan Tendaron en ĈSR. Mia vojaĝo efektiviĝis, ĉar mi ricevis de la ŝtato deĵoran pasporton. Ĉi tiu okazo estis la unua en la historio de nia movado, ke junulo el Hungario povis vojaĝi oficiale je eksterlando viziti Esp. aranĝon. Nun, kiam finiĝas la SET-vivo, kaj mi forlasis vian belan landon, kore mi rememoras je la agrablaj tagoj, je la tendarfajroj, je la grandsignifa junularkunveno. Mi esprimas mian dankon pro la gastigado, pro la helpo por nia junulara movado. Tre plaĉis al mi la art-vespera programo kaj junularkunveno aranĝita en Hradec. En la konferenco mi informiĝis pri viaj rezultoj kaj planoj. Mi ĝojis tre, kiam estis menciita la Hungara Esperantista Junularo, ties kontakto kun vi.

Kiel mi diris en la konferenco, la celo de mia vizitado estis: gajni spertojn el via movado kaj tiujn utiligi en la Hungarlanda E-Junulara movado. Mi mencias kelkajn rimarkojn okaze de la tendara restado. Tre bona junulara Esp. vivo estas en ĈSR. La gvidantoj de la Esperanto-Junularo laboras entuziasme por la movado, ĉi tiuj eminentaj gvidantoj, kun kiuj ankaŭ ni konatiĝis estas: s-anoj J.Mařík, V.Echtner, Vl.Novobilský, J.Kuznik. Seriozaj organizantoj, kiuj neniam laciĝas: s-anoj Solnický kaj Kočvara. La instruado estis tre altnivela. Ankaŭ mi mem multon lernis, precipe el la Esperanto-literaturo, kaj ankaŭ mia lingvokapableco pliperfektiviĝis.

Okaze de la Junularkunveno mi parolis pri la Hungarlanda Esperanto movado, pri la atingitaj rezultoj, pri sukcesoj kaj planoj. Ni ŝatus tre, se niaj planoj vere efektiviĝus. Bone estus, se pli ofte okazus internaciaj renkontiĝoj ankaŭ inter la hungaraj kaj ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Ni ĝojus, se ankaŭ ĉeĥoslovakaj esperantistoj vizitus nian landon.

Intertempe mi vizitis kelkajn Esperanto-rondojn. Mi estis en urboj Ostrava, Příbor, kaj Třinec. Precipe la Ostrava E-rondeto plaĉis al mi, kies kunvenojn oni vizitadas grandnombre. Mi esprimas mian dankon al s-ano Kočvara, kiu helpis en la efektiviĝo de ĉi tiuj vizitoj.

Post la signifa Konferenco kaj agrabla SET ni daŭrigas la Esperanto-laboron per nova freŝa forto.

Karaj geamikoj! Revenonte en mian landon mi prelegos pri viaj rezultoj, pri la SET-vivo, kaj ĝenerale pri miaj travivaĵoj. Mi scias certe, ke la Hungarlanda Esperantistaro ĝojos tre pro viaj rezultoj. Ni daŭrigu la laboron entuziasme kaj kuraĝe per Esperanto por paco kaj amikeco!

Imre Ferenczy

Du poemoj de Gustav Kremláček.

Saluto al kongresurbo

Rava Kopenhago, perlo apudmara,
ĉarma belulino de l' eŭropa nord',
miloj deziregas vin, ho urbo kara
kaj rigardas kun la am' al via bord'!

Vi gastigos konfesantojn de l' Espero,
kies koroj flamas per la sankta ard',
kies manoj portas firma super tero
brilan torĉon de l'homara avangard'.

Ĝis furor' eksonos super viaj stratoj,
ekrigardu alten al la firmament',
tie ŝvebos voĉ' de malproksimaj fratoj
al vi alportata per favora vent'!

Voĉo de la koroj vane sopirantaj
vin atingos kaj deflugos al la ter',
por aliĝi al esprimoj solenantaj
la ideon de frateco kaj liber'.

Kaj komuna ĵuro poste flugleviĝu
kiel la ĥoralo super Kopenhag'!
Ĉiuj fortoj en la peno unuiĝu
por la glora venk' de nia kara flag'!

Soldato de l' Espero

Terure songis mi. Soldat' mi estis,
staranta en tranĉeo sen kuraĝ'
premanta la fusilon, ĝi nur restis
en mano premligita per bandaĝ'.

Sentema koro finon antaŭvidis
kaj korpo estis jam sen ĉiu fort',
freneze mi kriegis, monstre ridis
renkonte al vizio de la mort'.

Kaj malamikoj estas jam ĉi tie,
trapikas mian bruston, trafas min,
senhonorigas korpon nun senpie,
per multaj vundoj senvivigas ĝin.-

Sed vidu! Songo mia jam ŝanĝiĝas!
Ne estas mi jam vir' mortanta plu,
leviĝas mi, genuas, eĉ strariĝas,
etendas brakojn al ĉiela blu'.

Antaŭen kuras mi; sed ne jam sola,

aperas apudflanke multaj nun,
soldatoj multaj kun rigardo mola
kaj ĉiuj marŝas sub brilema sun'.

Jen kreskas kaj firmiĝas vicoj niaj,
ni batalantoj estas kiel fer',
tremigas teron paŝoj energiaj,
tra l' tuta mondo sonas la Esper'.

Ĉu vi aranĝas ESPERANTO - EKSPozICION ??

Eble vi trovos tre efikan propagandilon en la kolekto de la afiŝoj kun la teksto: MEZINÁRODNÍ.
Tiaj estas nun tre oftaj ekzemple: "Mezinárodní den mládeže, Mezinárodní den žen, Mezinárodní den družstev" ktp. Dum unu semajno mi trovis en la ĵurnaloj dudek surskribojn "Mezinárodní" ekz.:
Mezinárodní ŝachový turnaj ktp. Kaj super ĉiujn ni aldonu ĉeĥan tekston:
Proč tedy ne také mezinárodní jazyk dorozumivací?
Esperanto se již přece osvědčilo, naučte se mu také
Není nic jednoduššího, následovat příkladu tisíce
jiných, kterým již ESPERANTO dlouho slouží,
možná že poslouží jednou dobře i Vám !!

Estingero

Rezulto de la kvara konkurso

Tekston de la ĉina rakonto konkurse tradukis ges-anoj: Kremláček, Kremláčková, Březina, Bečková (Žďár n.S.), Lorková, Werner (Brno), Zedníková, Petrtýlová, Novotný (Praha), Bohun (Nová Paka), Rejthárková (Hradec Králové), Michalová (Mokřý Lom), Chrápavý (Ostrava), Závodský (Žilina), Hořejší (Plzeň). Spritaĵon verkis aŭ tradukis ges-anoj: Hořejší, Březina, Kremláček, Kremláčková, Zedníková, Chrápavý, Lorková, Bohun, Rejthárková, Werner.

Ankaŭ en la tria parto "Kio mankas kaj kio superfluas en Tagiĝo" partoprenis preskaŭ ĉiuj ges-anoj. Multajn valorajn sugestojn kaj plibonigojn ni utiligos por venantaj numeroj de nia cirkulero. Konsiderante la serion de kvar konkursoj kiel tuton kaj pritaksinte a) la lingvaĵon en viaj tradukoj kaj originalaĵoj, b) temojn de viaj originalaj rakontoj, c) regulecon de via partoprenado en la konkursoj, mi elektis 3 plej bonajn s-anojn, kiuj venkis en la konkursoserio kaj estis publike premiitaj okaze de la Tutŝtata konferenco de esp. junularo en ĈSR en Hradec apud Opava. Ili estas

1. s. Fr. Březina el Žďár n.S. (Sinjoro Tadeo)

2. s. Gustav Kremláček, Žďár, (Sinjoro Tadeo)

3. s. Jan Werner el Junularo Brno (Ĉirkaŭ la mondon kun verda stelo - Scherrer)

Mi sincere gratulas al ilia sukceso.

El la Junularaj grupoj plej sukcese konkursis la grupo en Žďár n.S., en Brno, Plzeň kaj Pardubice. Gratulon!

La konkursoj estas daŭrigotaj en la venonta periodo gvidos ilin kompetenta s-anino el Praha Sonja Zedníková, kiu jam havas preparitajn 7 novajn konkurso-temojn. Mi deziras al s-anino S. Zedníková riĉan rikolton de viaj kontribuajtoj!

Vlastimil Novobilský
kultura delegito

Pro la publiko de oficialaj raportoj la traduko kaj plej bonaj spritaĵoj ne estos enpresitaj. Nova konkurso en tiu ĉi numero pro neatenditaj kaŭzoj ne aperos. (rim. de red.)

?~?~? Ekvacio ?~?~?

Serĉu en la suba ekvacio la valoron (signifon) de X sciante ke:

$X = (A-B) + (C-D) + (E-F) + (G-H) + (I-J) + (K-L) + (M-N) + (O-F)$.

A = planedo B = akvoleviĝo C = parto de la kapo, D = longa fera stango, E = romana imperiestro, F = parteto, G = enloĝanto de eŭropa lando, H = membro, I = ekleziulo, J = stelo, K = monaĥejo, L = frapo, M = iama imperiestro, N = kolekto, O = Geometria figuro, P = loko inter montoj. X = laŭdinda idealo.

Vorta aŭtomato

Gaja societa ludo konvena por komencantoj.

Ĉiuj ludantoj devas ekstarti. Gvidanto de ludo diros silabon A. Nun ĉiuj unu post alia laŭ la vico devas krei Esperantajn vortojn kiuj komencas je litero A ekzemple: afero, aeroplano, ano ktp. Estas malpermesite diri jam uzitan vorton. Kiu dum tri sekundoj ne kapablas rememori novan vorton devas eksteri kaj jam ne daŭrigas en ludo. Gvidanto de ludo ŝanĝas literon; ekzemple B kaj la ludo daŭrigas. La titolon "Vorta aŭtomato" gajnas ludanto, kiu persistas stari ĝis fino. Por ke ludo havu pli bonan instruan valoron postulu, ke diritan vorton ĉiu tuj traduku ĉeĥe; ekz.: afero - věc. Ĉiu devas rememori vorton sen fremda helpo.

MULTE DA SUKCESO! Dr

- o -

Lidová Demokracie pri SET.

Lastatempe multaj gazetoj raportas diversaĵojn pri ESPERANTO. Ankaŭ supre menciita gazeto en Praha publikigis 30/8 mallongan raporton pri la Somera Esperantista Tendaro kaj la internacia partopreno en ĝi.

(Fragmento el la hejma tasko por ekzamenoj de kategorio D en SET/56 de Radim Kudla.)

Malrapide ni proksimiĝas al la kerno de la afero (se ĝi en la artikolo entute estas). Malgraŭ tio, ke antaŭaj linioj parolas pri manko da novaj, samtempaj verkaĵoj, povus niaj kelkaj geinterpretantoj sporadaj inter ni, kaj ne ekzistantaj kantistaroj, ĉerpi el atingebla kvanto da uzebla materialo.

La unua nepra kondiĉo tamen estas ekzisto de la ĥoroj kaj ĥoretoj, ekzisto de diversaj grupetoj, kiuj okupas sin per kultura laboro.

Iam, kiel la pionira kantrondeto funkciis la ostrava junularo, mallonge ankaŭ Junularo-Praha. Ili ambaŭ estis anstataŭigitaj de sukcesema kanthoro de opavanoj. Hodiaŭ oni nur bedaŭrinde povas ilin rememori. De tempo al tempo aperadas en gazetoj raportoj pri oportune faritaj programoj iam eĉ kun kantado, kiel ekzemple en Brno k.s. - Necesas f o n d i g i tuj kelkajn kantistarojn! Kial?

Lastatempe atingis belan, sekvindan sukceson la praha teatro-rondeto (ĉeEKP) "Verda ĉaro de J.Baghy" per teatraĵoj "Maryša", "Pygmalion" k.a.. La teatra maniero taŭgas antaŭ ĉio nur por esperantistoj, ĉar kiu nian lingvon ne konas, kapablas nek nur laŭ mimiko ekkoni la enhavon kaj ideon de la ludo.

La kanto sendispute posedas tiuokaze pli grandajn eblecojn. Ĝi havas pli facilan alireblon al koro de kiu-ajn aŭskultanto - eĉ ne esperantisto. Sufiĉas al partoprenanta publiko doni krom esperantlingva teksto ankaŭ tekston por ĝi komprenebla kaj tuta kultura ĝueco de aŭdita programo restos por ĝi preskaŭ ne tuŝita.

Bona, eĉ se ne grandega kanthoro kaj solistoj povus fari pecon da utila laboro. Efektiveco, ke la agado de ĥoroj inkluzive la popolkantemon en nia lando dum pasintaj jaroj ĝenerale krizas maldevas al ni forpreni la apetiton. Ne diru, ke mankas komplezuloj ĉar traktas nur pri tio sukcese vekigi dormantan muzikan dilentantismen ĉe niaj anoj. Intencante fondi kantrondeton en sia


grupo oni renkontiĝas maksimume kun du malsamaj kategorioj: a) gejunuloj, kiuj kantas bone kaj bele, b) gejunuloj kantantaĉaj.

Ĉefajn malfacilaĵojn faras la "moŝtoj" bone kantantaj, sed rifuzantaj kunlabori. Dependas je gvidanto, kiel oni solvos la problemon kun obstinaj kapoj. Multe pli granda danĝero minacas de viglaj ĉieestuloj, kiuj kanti v o l a s, sed ne s c i a s! Do atentu je ili! Se kuniĝos rondeto enhavanta 4- 5 homojn, ni pravos glori feston. Fondiĝon de ĥoro pli ol 10-ana en limoj de niaj ĝenerale konataj eblecoj, oni konsideras miraklon. Kiam ni ŝvititaj kunligis la sopiratan grupeton, komencas la propra agado. Post la antaŭparola prelego enhavanta admonojn, ke bonaj rezultoj de la komuna laboro tenas la rondetanoj en propraj manoj, ke oni supozas de ili modelan, libervolan disciplinon k.s., povas ĵus naskita kantrondeto - se ĝi havas apertan, ofereman, ĉiam preparitan ĥorestron - elpaŝi sur gloran vojon konkursi laŭrojn...



1. Voj' nia gvidas al arbaro
marŝadas ni laŭ laga bord',
pluope aŭ en gaja paro
de lipoj sonas kanta vort':
2. En brustoj koroj batas june,
ni Esperanta estas rond',
ĉe flanko flank ni marŝas kune
al burgruina verda mont':
3. Ni restu veda familo
ligota daŭre de l' fidel',
sen misa pens', en harmonio
antaŭen sub la verda stel':

Refr.: Marŝu ni, kantu ni, hala, hola hej, hola hola hej



1. Negrasa estaa Yankee-knab'
kaj ĉie favorat', he!
ĉe danco, ludo, sport' kaj bal'
samvigla kiel rat', he!
2. En politik', balotoj kaj
sportludoj li ĉeestas.

kaj de l' komerco la profit'
en liaj manoj restas.

3. Al lia glora hejma land'
fidela ĝis la osto,
kaj „Yankee doodle doo“ por ĉiam
restas lia tosto.

Refr.: Yankee, gardu ĉe marbord', Yankee doodle dandy! Ridu pri minaca vort, Yankee doodle dandy!

(Yankee = duonŝerca nomo por amerikano; doodle = maldiligentulo, dandy = dando. Esprimu: *jenki dudl dendi!*)

Gesamideanoj Anička Veselá kaj Jaroslav Mráz sciigas, ke ilia geedziĝo okazis la 4-an de aŭgusto 1956 en la urbodoma de Rokycany.

Gesamideanoj Jarmila Cahlová kaj Jaroslav Kuzník sciigas, ke ilia geedziĝo okazis la 29-an de septembro en preĝejo de St.Spirito en Opava.

Ni gratulas al ambaŭ paroj kaj deziras al ili ĝojplenan vivon!

Neesperantistaj helplingvaj projektoj

ilia hodiaŭa situacio kaj nia rilato al ili.

(Por Tagiĝo, kun la afabla permeso de la aŭtoro adaptis Novobilský.) Dr Jaromír Jermář

En tiu ĉi artikolo mi neniel volas detale priskribi la kompletan historion de ĉiuj lingvaj projektoj, kiuj aperis antaŭ aŭ post la kreo de Esperanto. Mi ankaŭ ne volas tuŝi la lingvan problemaron de tiuj ĉi projektoj; mi nur birdperspektive volas skizi ilian hodiaŭan situacion kaj montri ĝeneralan tendencon de ilia evoluo, por ke ankaŭ esperantistaro estu objektivite informita per la vivo de ĝia "duonfrataro."

Ĉiu moderna historio de la mondlingvo devas komenci de Volapük. Tiu fariĝis la simbolo de nekomprenebleco kaj kiel tia ĝi ankaŭ eniris en la trezoron de la ĉeĥa kaj slovaka lingvoj, kie signifas tiu ĉi vorto "ion nekompreneblan, ŝaradon". Pri Volapük scias preskaŭ nenion niaj junaj gesamideanoj, kaj estas iom malĝoje por esperantista propagandistaro, ke preskaŭ neniu konas Volapukon, ĉar abunda volapükista gazetaro enhavas riĉan materialon, kies trastudo povus multe helpi al nia laboro propaganda kaj ankaŭ al prilumigo de la historio de internacia lingvo. Sed nun la demando: kial hodiaŭ paroli pri Volapük, kiu certe apartenas al historio? La respondo estas iomete surpriza. Volapük ekzistas ĝia nun, ekzistas ĝis nun volapükista organizo kaj estas eldonata gazeto sub la eleganta nomo "Volapükagazed pro Nedanŝpükana" (Volapüka gazeto por nederlande parolantoj), kiu aperas en Nederlando. En volapük aperis ankaŭ en la jaro 1931 granda vortaro (500 paĝoj) "Wörterbuch der Weltsprache" en germana lingvo, en la jaro 1931 gramatiko "Gramat Volapüka" nur en Volapük kaj en la jaro 1933 "Lehrbuch der Weltaprache Volapük". Estas interese, ke tiu ĉi lingvo ne estas la klasika Volapük de Schleyer, sed lingvo iom reformita, sed nur en sensignifaj principoj. La eldonado de tiuj ĉi kuriozaĵoj, kiuj certe ne povas garantii al la eldonistoj eĉ rekompencan de elspezoj, estas certe surpriza por ĉiuj, kiuj konas malfacilaĵojn financajn, kiuj malhelpas la interlingvan propagandon. La respondo ne estas tiom surpriza: hodiaŭaj volapükistoj povas eluzi financan heredaĵon, kiuan postlasis Schleyer al sia aŭtokrate konstruita volapükista organizo.

Nun mi alpaŝas projektojn, kiuj estas hodiaŭ pli konataj kaj kiuj eĉ nun havas certan influon en la historio de la internacia lingvo. Unua el tiuj ĉi projektoj estas Ido, lingvo de la Delegitaro. Ido

estis iam la plej danĝera konkuranto de Esperanto. La batalo inter Ido kaj Esperanto estis batalo, kiu alportis multe da perdoj por Esperanto kaj ankaŭ por la ideo de la internacia lingvo, ĉar nenion komprenanta indiferenta publiko prave demandis, kial necesas tiom fortaj kalumnioj en esperantistaj kaj idistaj gazetoj. Oni ne nur atakis lingvon, sed ankaŭ personojn, oni lavis malpuran tolaĵon de esperantistaj kaj idistaj funkciuloj kaj tiel ridindigis la aferon de la internacia lingvo. Mi dezirus bone rememorigi tiun ĉi ne tre gloran epokon de la interlingva historio al la junularo, por ke ĝi neniam permesu tian formon de la batalo kontraŭ adeptoj de aliaj projektoj. Ankoraŭ hodiaŭ la epoko de Ido signifas por multaj esperantistoj dolorigan rememoron, kiu malebligas objektivan studon de la idista historio. Ido estis siatempe forta movado, ĝi havis fortan organizon, reton de delegitoj, multajn ĵurnalojn kaj multaj eminentaj esperantistoj forlasis nian movadon – idistiĝinte. Ankaŭ ĉe ni estis sufiĉe forta idista movado. Esperantistan movadon forlasis kaj transiris al Ido ekz. s-ano Chalupecký, iniciatanto de la unua Spartakiado. Sed estas interese kaj instrue studi la sekvontan historion de Ido. Post certa kulmino post la unua mondmilito, komencis rapida kaj abrupta disfalo de la idista movado, disfalo tiom forta kaj rapida, ke el floranta movado restis hodiaŭ nur etaj restaĵoj, el abunda idista gazetaro restis nur unu presata organo Progreso. Hodiaŭ estas idistoj organizitaj en Unio por la Lingvo Internacia Ido, en kiu gravan rolon ludas progresema redaktora Hans Jacob; kun lia persono venkis en idista movado progresema kaj toleremaj tendencoj, serioza pristudo de la lingvaj problemoj kaj batalo por la ideo de internacia lingvo. Progreso, unusola presita organo idista, estas bone redaktita gazeto, kiu povas eĉ servi kiel modelo por multaj esperantistaj ĵurnaloj. La plej fortaj idistaj insuletoj estas en Anglio, Francio kaj Svedio. Niaj idistoj ĉesigis sian organizan vivon en la jaro 1937. Parolante pri idistoj, estas necese diri kelkajn vortojn pri ilia sinteno al Occidental kaj al Esperanto. Occidentalistoj kaj interlingvistoj en multaj okazoj proponis al idistoj kunlaboron; estas interese, ke idistoj ĉiam rifuzas tre intiman kunlaboron, ĉar kunlaboro de occidentalistoj montriĝis pro idistoj preskaŭ ĉiufoje mortiga. La principoj de Ido estas profunde Esperantaj principoj, Ido estas ja Esperanto reformita. Idistoj do preferas aŭ preferus la venkon de esperantistoj pli volonte ol la venkon de Occidental aŭ Interlingua. Tial ankaŭ idistoj tre tolereme akceptis kaj eĉ subtenis la rezolucion de Unesco, kompare kun occidentalistoj, kiuj tre netolereme eĉ subfose agis en tiu ĉi kazo.

Ankaŭ en Ido komencis reforma movado, kiu finiĝis per kreo de Novial. Fundamento de Novial. Fundamento de Novial estis libro de mondkonata lingvisto Jespersen, kiu estis eldonita en 5 lingvoj (An International Language). Reformemaj idistoj grupiĝis ĉirkaŭ la revuo Mondo, kiu transformiĝis en la jaro 1935 en la revuon "Novialiste, revue por li cosmopoliti standart lingue". Novial, kiu celis al naturalismo, ĉiam deklaris kaj ankaŭ pruvis, ke ĝi estas nur eksperimenta lingvo. Ankaŭ tiu ĉi klasika Novial estis reformita, kaj dum la dua mondmilito ĝi mortis, kun la morto de Jespersen (1943) kaj redaktoro de Novialiste, s-ro Ahlberg (1945). Jespersen multe kunlaboris kun de Wahl, aŭtoro de Occidental. Nun la plejmulto de novialistoj estas en vicoj de occidentalistoj aŭ de interlingvistoj.

La duan mondmiliton ne transvivis, ankaŭ simpatia projekto de la fama filozofo kaj matematikisto Peano, "Latino sine flexione". Latino sine flexione ne estas projekto de internacia lingvo, nur helpa lingvo de iama volapukista akademio, kiu unue el Kadema volapüka transformiĝis en la liberan akademion de interlingvistoj kaj komencis ekuzi Idiom neutral kaj poste uzis lingvon latinan "sen gramatiko", kiel diris Peane. En tiu ĉi lingvo aperis ankaŭ oficiala organo de Akademio, "Schola en vita", belaspekta revuo kun interesa enhavo. Nur mallonge antaŭ la dua milito oni komencis fari propagandon por tiu ĉi lingvo sen gramatiko, sed post la dua milito ĉiu ĉi propono mortis. Estas interese, ke en tiu ĉi projekto estis eldonitaj meteorologiaj informoj de kelkaj meteorologiaj stacioj.

Occidental, nun Interlingue, estas post la disfalo de ido, unusola projekto de internacia lingvo, kiu havis relative grandan sukceson. Ĝi grupigis ĉiujn adeptojn de naturalismo en interlingvistiko. Ĝi estas interesa pro tio, ke ĝi ne estas konstruita sur Esperantaj principoj, kiel Ido kaj aliaj projektoj. Occidental estas la sola movado, kiu nur per propraj rimedoj kaj donacoj gajnis adeptojn kaj eldonadis gazetojn, lernolibrojn k.a. Oficiale estis Occidental publikigita en la gazeto Kosmoglott, kiun eldonadis fama interlingvisto Rosenberger, sed la propagando por Occidental

komenciĝis nur en la jaro 1926, kiam apogis Occidentalon grupo de vienaj inĝenieroj, kiuj donis necesan sumon por eldono de lernolibroj kaj gazeto Cosmoglotta. Hodiaŭ ekzistas lernolibroj de occidental en ĉiuj gravaj lingvoj, eĉ en Esperanto kaj en la ĉeĥa lingvo. En Ĉeĥoslovakio estis sufiĉe forta occidentalista movado, eble la plej forta en la mondo. Ĉeĥoslovakaj occidentalistoj havis organizon kaj eldonadis antaŭ la milito multobligitan ĵurnalon Occidental-bulletin, post la milito Voce de Praha. Nun ili komencas eldonadi multobligitan ĵurnalon Globus-corespondent. Ĉeĥoslovaka movado havis ĉirkaŭ 300 adeptojn, la tuta Occidental-Union ĉirkaŭ 1000 adeptojn.

Kompare kun hodiaŭaj idistoj estas occidentalistoj pli netoleremaj kaj pli atakemaj. Oni devas ankaŭ objektivite konfesi, ke ankaŭ multaj esperantistoj donis per siaj naivaj argumentoj kaj per sia incito kaŭzon al rebato de occidentalistoj. Sed hodiaŭ oni ĝenerale konsentas, ke oni devas diskuti serioze, pere de argumentoj kaj ne pere de kalumnioj. Tio nature estas necesa por ambaŭ partoj. Sed estas seka vero, ke fanfara troigado de occidentalistoj pri supereco de ilia lingvo fiaskis en la praktiko, ĉar occidentalistoj ne sukcesis varbi eĉ dekonon da adeptoj, kiun havis iam Ido; oni eĉ multfoje ne kapablis eldonadi unusolan presitan gazeton. Kaj okazis ankaŭ io, kion occidentalistoj neniam atendis: aperis nova lingvo, laŭ propagando pli moderna, kiu estas bazita sur samaj principoj kiel Occidental, kaj occidentalistoj devas batali kontraŭ tiu ĉi nova lingvo, kiu rabas iliajn adeptojn. Kaj tiu ĉi lingvo, lingvo de IALA, estas pli bone donacita per mono, ĉar multaj usonaj institucioj subtenas tiun ĉi projekton. Jen ni vidas, kiel occidentalistoj batalas kruelan lukton por gajni sian vivon.

IALA estas organizo fondita de Alice Vanderbilt Morris, vidvino de usona ambasadoro en Belgio. Tiu ĉi organizo havis kiel celon interŝanĝon de studoj kaj informoj pri internacia lingvo. Ĝi multon faris por la pristudo de la internacia lingvo: en ĝiaj kunvenoj kunvenis multaj eminentaj esperantistoj, idistoj, occidentalistoj kaj eĉ lingvistoj ne okupiĝantaj pri internacia lingvo. Morris multe simpatiis kun Esperanto. Sed IALA fariĝis pli kaj pli multe fabrikejo por nova internacia lingvo, speciale post la morto de Morris en la jaro 1950. Post la dua milito estas publikigita granda vortaro de Interlingua (nomo de tiu ĉi nova lingvo) kaj oni komencis propagandon por tiu ĉi lingvo. Nun estis eĉ fondita organizo kaj estis eĉ unua kongreseto de adeptoj de tiu ĉi lingvo. Multaj occidentalistaj organizoj ne transvivis tiun ĉi atakon, multaj occidentalistaj multobligitaj presaĵoj fariĝis dulingvaj. Interlingua kun amerikana "Keep smeeling" proponas kunlaboron al occidentalistoj, kunlaboron, kiu preskaŭ ĉiam finas per la morto de ĝia partnero. Kaj tute malfermite dirite, oni estas multfoje surprizita per tiu ĉi facila venko, ĉar se oni ŝatas naturalismajn principojn en interlingvo occidental estas certe pli perfekta.

Kion konkludi el tiu ĉi malgranda resumo? Ni vidas, ke Esperanto venkis en ĉiuj bataloj kontraŭesperantistaj; sed tio certe ne signifas, ke oni devas rebati ĉiujn argumentojn de kontraŭuloj per neseriozaj manieroj. Oni devas serioze kaj science studi la problemon de la internacia lingvo kaj eĉ studi la argumentojn de adeptoj de aliaj projektoj. Ni devas ĉesi pensi, ke ĉiu adepto de alia sistemo estas denaska kontraŭesperantisto, kaj ke li volas nenion alian ol detrui nian lingvon. Ni devas agnoski, ke ankaŭ ili estas "samideanoj", ke ankaŭ ili havas la saman ideon, nome la ideon de la internacia lingvo, do, ke ili estas niaj duonfratoj. Oni devas vere profunde taksi la sintenon de Esperantologio kaj de Heroldo de Esperanto, kiuj senmoke studas aliajn projektojn kaj kontraŭ argumentoj starigas siajn argumentojn science fundamentitajn. Sed ankaŭ adeptoj de neesperantistaj projektoj devas multon fari por ne malseriozigi interlingvan aferon. Ili devas ĉiam vidi la simplan fakton, ke esperantistoj estas eĉ post multjara propagando ĉiam kvincentfoje pli fortaj ol la neesperantistaj interlingvistoj. Se nenio, almenaŭ certa modesteco devas rezulti el tiu ĉi fakto. Ili vole nevole devas multfoje subteni eĉ Esperanton, ĉar publiko ofte kunmiksas Esperanton kiel sinonimon de internacia lingvo. Estas absolute neprava occidentalista argumento, ke la publiko ne akceptas lingvon internacian, ĉar ĝi estas repuŝita de malavantaĝoj de espo. Se tio estus vera, post 30 jaroj de occidentalista propagando Occidental devus havi multfoje pli da adeptoj ol havis Esperanto en la jaro 1910. Sed la malo estas vera. Malgraŭ tio, tiu ĉi argumento ĉiam reaperas en la occidentalistaj propagandiloj. Nature, ne estas ankaŭ dece, se esperantistoj parolas pri aliaj projektoj kiel pri "fuŝlingvoj" kaj simile. Kalumnioj neniam estas bonaj argumentoj.

Esperantistoj kredas je sia lingvo ne kiel fanatikuloj, sed tial, ĉar la praktika vivo kaj

praktika uzado pruvis pravecon de fundamentaj reguloj de Esperanto: kaj tio estas la plej bona kaj forta propaganda argumento.

RESUMA HISTORIO DE LA ESPFRANTO-MOVADO.

(Broŝuro) Ellaborita ĝis j. 1955. Teknikaj notoj:

Kompilis: Jaroslav Mařík

Celo: Por studceloj en Somera Esperantista Tendaro junulara en ĈSR (kursoj C kaj D).

Eldonis: (Multobligite) Esperanto-Fako de Domo de Kulturo P. Bezruč en Opava.

Amplekso: 40 paĝoj (I-III kaj 1 – 37), formato A-4 dense skribitaj.

Divido de la materialo: Antaŭparolo; Fontoj;

I-a parto: Laŭperioda resumo (kronologia);

II-a parto: (laŭfaka, pĝ. 1-37): Tutmonda movado; Movado en ĈSR; Junulara movado ĈSR.

Destinita por la partoprenantoj de Somera Esperantista Tendaro. Pro malgranda eldonkvanto estos vendotaj nur kelkaj pecoj. Mendebila (ĉefe por uzo de grupoj) ĉe Jar.Kuzník, Mendlova 21 Opava, kontraŭ Kčs 8,- afrankite.(Liverebla prefere nur po unu ekzemplero).

(Noto: La historion de la tutmonda movado inter la jaroj 1937-1955 mi ellaboris memstare. La historio de la movado en ĈSR estas ellaborita surbaze de la historia Raporto por UNESKO / 1953/ de d-ro St. Kamarýt, la ĝenerala skizo pri la jaroj 1945-1955 /pĝ. 28-30/ de mi memstare. El alia manuskripto de d-ro Kamarýt /en 1955 ankoraŭ ne finita, detala Historio de la E-Movado en ĈSR/ estis transprenita sole la listo de naciaj kongresoj en ĈSR. La 4-paĝan junularan historion mi ellaboris en kunlaboro kun Drahomír Kočvara.

Simila broŝuro pri la Esperanta Literaturo estas verkata de Vl. Novobilský, instruanto de SET pri literaturo.

Mařík.)

Esperanto en ĈINIO

La stato de Esperanto en Ĉinio restas ankoraŭ malfavora. Ni sciiĝas pri tio el letero de eŭropa s-ano vivanta en ĈPR.

Li skribis i.a: "Mi sukcesis interkompreniĝi en Ĉinio per Esperanto sole ĉe unu okazo kaj krom tio kun granda peno. La esperantistoj utiligas tie ĉi Esperanton laŭ sia plej bona eblo kaj kun diversaj rezultoj kaj ne estas ĝusta danko, kiun ili rikoltas kompanse... Iujn klubojn aŭ eble memoraĵojn pri la estinta ĉina Esp. asocio aŭ redakcio de la estinta "El Popola Ĉinio" vi vane serĉus kaj eĉ inteligenta ĉino scias absolute nenion pri Esperanto. Ĝi estas malĝojiga fakto, kaj neniu provizore ion faras por tio . "

Ni tamen estaa konvinkitaj, ks aliigo de tiu situacio estas nur demando pri la tempo.

ATENTU!

Ni petas ĉiujn eksterlandajn legantojn, kiuj povus al ni doni iujn sciigojn pri nuntempaj vivo, laboro kaj aliaj similaj aferoj de blinduloj en iliaj landoj, ke ili tion al ni afable skribu. Detale ni interesiĝas pri la enkondukado de la nevidantoj en laboron kaj iliaj laboreblecoj kaj kondiĉoj; pri blindul-lernejoj k.a. ĉiu letero estos respondita. Adreso: Kudla Radim, Maltézske nám. 14, PRAHA III. ĈSR.

Ĉiuj kiuj estas en skriba kontakto kun Jar. Kuzník, notu lian novan adreson:

Jaroslav KUZNÍK, Mendlova 21, O p a v a.

Korespondi deziras:

Mi estas 28 jara sinjorino kaj anino de Esp.-junularo en Praha. Mi volus korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj kaj interŝianĝi bildojn, vidaĵkartojn, kantojn, naciajn fabelojn, deklamaĵojn ktp. Mi estas esperantistino jam de miaj 11 jaroj kaj mi volus korespondi amike. Skribu al:
Sonja Zedníková, Modřany ĉ.1482, P r a h a, ĈSR.

Kontakti kun junaj eeperantistoj en ĈSR estas grande deziro de jenaj ges-anoj (pri la persona karakterizo respondas s-ano, kiu ekkonis ilin):

BULGARIO: du ĉ. 20-jaraj belaj Bulgarinoj dez. korespondi kun junaj, plaĉaj, inteligentaj /!/ ĉeĥoj:
Vasilka Petrova, str. Balkan 10;
Julija Staevska, str. Gabrovo 20, ambaŭ en Sofia.
Tre bona esp-istino Liliana Conkovski, str. "Boris I 140, Sofia, studentino de rusa lingvo, dez. korespondi kun studentoj. Same medicinstudentino Ceca Stamenova, str. Neofit Rilski 56, SOFIA.

JUGOSLAVIO:

Mile Radošević, Ul.Vojvoda Mišica 3, Cuprija, studento de franca lingvo, bonega esp-isto, travojaĝis per Esp-o la tutan Okcidenton;
Milan Marković, str. Rajičeva 22/2, Beograd, stud. de franca lingvo, prezid. de studenta E-Klubo.

- 0 -

"Pri la Esperantista Junularo en Ĉeĥoslovakio "

estas titolo de sepaĝa dense maŝinskribita raporto pri la laboro, historio kaj aktuala stato de la ĉs. junulara esp. movado, kiun nia Centrejo sendis al la landaj esp. centroj en Pollando, Hungario, Bulgario, al grupoj en Leningrad kaj Moskva, al Erevan (Armenio) kaj al Tutmonda Esperanto-Junular-Organizo.

- 0 -

Skribu al TFDJ!

TFDJ serioze okupiĝas pri esperanto kaj preparas esperantistan tendaron en la moskva festivalo 1957. Ĝia plurlingva revuo publikigis korespond-dezirojn per Esperanto. Necesus pliaj alskriboj rilate la festivalon kaj junulartemojn. Skribu en Esp. al: Tutmonda Federacio de Demokrata Junularo, Benczur ut. 34, Budapest 6, H u n g a r i o.

Eduku denaskajn esperantistojn

Ni rekomendas al ĉiuj esperantistaj gepatroj bonan helpilon por esperantlingva edukado de iliaj infanoj. Ĝi estas "Bulteno Gepatra", kiu per diversaj artikoloj informas pri dulingva edukado de infanoj. Ĝi donas konsilojn, publikigas diversajn poemetojn kaj rakontetojn porinfanajn. Ni devas komenci gvidi jam en hejmo niajn infanojn kaj farigi el ili denaskajn esperantistojn. Skribu kaj mendu la bultenon je adresa: F. Moravec, Twedterholz 15, Flensburg, Germanio aŭ al: "Bulteno Gepatra", s-ro W.Brandenburg, Wilhelmstr. 38/I, Münster i. Westf., Germanio.

Presajoj de Esperanto-Missionen.

Tre interesan instruan kaj edukan materialon oni povas ĉerpi el la presajoj de svedaj kristanaj esperantistoj. Precipe kajero 7 de Esperanto Missionen, geknaba specialnumero transdonas al siaj legantoj kelkajn preĝojn por Esperanto-infanoj. Bela rakonteto porinfana vere karakterizas la ĉi-aman bonan enhavon de la presajoj.

Ni rekomendas peti senpagan sendon de provnumeroj de la presajoj ĉe: ESPERANTO-MISSIONEN, Klackavágen, Nora stad, S v e d u j o.

- 0 -

GRAVA ATENTIGO!

Vi certe bezonas helpon dum la aŭtunaj kurspreparoj! Kun ĝojo ni informas vin, ke Somera Kolegio de Esp. en Doksy ĵus eldonis sub la aŭspicioj de TKKE modernan varbilon kun plej aktualaj informoj kiujn certe kun granda intereso tralegos ĉiu neesperantisto. Prezo nur reĝia. Mendu tuj ĉe Václav Špŭr, Moskevská 453, Doksy u Mách. jezera.

- 0 -

IMITINDA EKZEMPLO DE POLAJ SAMIDEANOJ.

En niajn manojn venis grandformata belege ilustrita kaj lingve senerara revuo POLLANDO - por la unua fojo en Esperanto (nro 7-a 1956). Normale ĝi aperas en la lingvoj: pola, angla, franca, germana, hispana kaj rusa. Kun miro kaj envio ni gratulas al niaj polaj amikoj kaj dankas al ili pro la pliproksimigo de la frata Pollando. Nian sinceran gratulon ni tuj ankaŭ esprimis al la Pola Informa Oficejo en Praha. Tuj ni ankaŭ aranĝis la grandkvantan aĉeton de tiu ĉi revuo ĉe KNIHA, Václavské nám. 42, Praha II., kie ĉeĥoslovaka esperantistaro facile povas mendi la revuon. Post la tralego de tiu ĉi juvelo de revuoj esprimu vian dankon kaj admiron al la Asocio de Esperantistoj en Pollando Warszawa, Kozia 3 - al kiu ni ankaŭ esprimas la admiron de nia ministerio por lernejoj aferoj kaj kulturo, kiun eble la pola ekzemplo instigos al simila faro.

(deskribita el bulteno TKKE informas 7)

DEMANDARON

kiu helpas prepariĝon por la ekzamenoj ni aldone de tiu ĉi numero sendas senpage al la grupoj.

Demandaro konsistas el: a) antaŭparolo por Demandaro, b) ekzamenaj demandoj el gramatiko, c) el literaturo, d) el la historio, e) rekomendita literaturo. Ekzamenaj demandoj estas por lingvaj kateg. A,B,C,D. Ni petas la s-anojn, kiuj ricevos la Demandaron, doni ilin al uzo de siaj grupoj.

Romain Rolland:

"Por ke la popoloj interkompreniĝu, estas necese ke ili unue kompreniĝu."

Louis Lumière,

membro de la Franca Académie des Sciences:

"Mi estas konvinkita, ke la ĝeneraligo de la uzo de Esperanto povas havi la plej feliĉajn konsekvencojn por la internaciaj rilatoj, kaj por la efektivigo de universala paco."

- 0 -

Lastmomenta telegramo

OLOMOUCKÁ KONFERENCE SE PŘÍPISEM MINISTERSTVA ŠKOLSTVÍ ODKLÁDÁ NA NEURČITO – MAŘÍK - 21.9.56

Ni esperu, ke tiu ĉi ne ĝoja sciigo baldaŭ klariĝos kaj la konferenco, je kiu ni jam tiel ĝojis, pro starigo de nova Esperanto Asocio en ĈSR, tamen okazos.

Ni petas la Tutŝtatan Kosultan Komitaton Esperantistan, fari ĉion eblan por reakiri la jam bone evoluintan pozicion de nia afero en nia ŝtato kaj la eblan miskomprenon glate klarigi.

Multan sukceson en via agado

red. de TAGIĜO.

El Esperanto-mondo per unu frazo:

·La 41-an Universalan Kongreson de Esperanto en Kopenhago partoprenis pli ol 2.200 esperantistoj el 43 landoj.

·Universitata rektoro, prof. D-ro Giorgio Canuto, estas elektita kiel nova Prezidanto de UEA.

·La 42-a Universala Kongreso okazos en Marsejlo, Francujo, la 4.- 9.-a de aŭgusto 1957.

- La 12-a Internacia Junular-Kunveno de TEJO okazis la 28.7.-4.8.1956 en Büsum kun partopreno de 300 gejunuloj.
- Jam 2000 kursanoj frekventis la kursojn de Somera Kolegio en Doksy dum ĝia dekjara funkciado.

